Ferdoŭsio estas konsiderata kiel la plej granda persa poeto, aŭtoro de la Ŝahnameo, la persa nacia epopeo, al kiu li donis ĝian finan, kaj daŭreman formon. Li bazigis sian poemon plejparte sur pli frua proza versio. Por preskaŭ mil jaroj la persoj daŭre legadis kaj aŭskultis deklamojn de lia ĉefverko. Ĝi estas la historio de glora pasinteco de Irano, konservita por ĉiuj tempoj en belsonaj kaj majestaj versoj. Kvankam skribita antaŭ 1000 jaroj, ĉi tiu verko estas tiel komprenebla por la ordinara, moderna iranano, kiel la Reĝo James (elp. Ĝejmz) versio de la Biblio por moderna anglaparolanto. La lingvaĵo, utiligita por la poemoj estas surbaze de pahlavia originalo; ĝi estas pura persa kun nur la plej eta miksiĝo kun la araba.

Inform-fonto pri Lia Vivo

La vivo de Ferdoŭsio, kiel lia epopea ĉefverko estas miksita kun legendoj. Diversaj fontoj eldiras variajn rakontojn pri li. Tamen, unu el la pli detalaj kaj pli aŭtentikaj fontoj pri lia vivo estas Ĉahar Magale (Kvar Artikoloj) aŭ alinome *Maĝma-on-Navader* (Kolekto de Raruloj) verkita en 1171 p.K. per Abol-Hasan Nezam-od-Din Ahmad-ebne Omar-ebne Ali de Samargando, konata kiel Nezami Aruzi. Kvankam verŝajne ankaŭ en tiu ĉi fonto ekzistas misinformoj kaj miscitoj, tamen legendaĵoj ĝiaj ŝajnas malpli multaj kompare al aliaj fontoj. Tiu ĉi artikolo plejparte prezantas la rakontojn laŭ ĉi font-verko. Pli certaj misinformoj estos klarigitaj.

Ferdoŭsio per Ŝahnameo, re-temigis la persan, ekflorigis ĝin per reaplikado de pure persaj vortoj, kaj faris el ĝi akson por naciaj konscienco kaj identeco inter ĉiuj irananoj.

Ekzemple, laŭ Nezami, Ferdoŭsio estis *dehgan* (bienhavanto), ĝuanta komfortan enspezadon el siaj bienoj. Li havis nur unu infanon, filinon, kaj la ĉefa motivo por ke li ekprenis la plumon por la tasko, kiu okupis lian tempon por pli ol 30 jaroj, estis provizi valoran doton por ŝi. Multaj dubas pri diraĵo de Nezamio ĉi-prie, ĉar unue Ferdoŭsio plejeble havis ankaŭ filon, kiu - kiel dirite en Ŝahnameo - forpasis kiam estis 37-jaraĝa. Dum bela poemo Ferdoŭsio diras: “Mi devas utiligi la konsilon de mi mem, kaj pripensi la morton de mia filo. Estis mia vico (por morti) sed tiu junulo foriris, kaj sekve de ĉagreno perdi lin, mi estas kvazaŭ senspirita korpo. La junulo, kiam 37-jariĝis, forlasis la mondon neatinginte siajn deziraĵojn.”

Due, Ne ŝajnas logike komenci 30-jaran taskon je 40-jaraĝo por prepari doton por filino, kiu ĝis tiam ja estus delonge edziniĝinta! Lia motivo certe ampleksis aliajn ambiciojn kulturajn, pri kiuj skribiĝos pli detale sube.

La vivokazaĵoj de la majstro Abol-Gasem Ferdoŭsio, ĝuste kiel la ravaj rakontoj de lia eterna ĉefverko Ŝahnameo, estas allogaj historie kaj miksitaj kun legendoj.

La Origino de Ŝahnameo

Ŝahnameo de Ferdoŭsio, poemlibro entenanta preskaŭ 60,000 versduojn, estas bazita plejparte sur proza verko samnome kompilita en frua viraĝo de la poeto en lia naskiĝejo Tus. Ĉi tiu proza Ŝahnameo estis siavice kaj plejparte la traduko de pahlavia (Meza Persa) verko, nomata la Ĥvataj-namak, historio de la reĝoj de Persujo de mitaj tempoj daŭre ĝis la regado de Ĥosroŭ La Dua (590-628 p.K.), sed ĝi ankaŭ enhavas pluajn materialojn daŭrigante la historion ĝis la forigo de la sasanidoj (226-636 p.K.) per la araboj preskaŭ meze de la 7a jarcento p.K. Unuafoja persono, kiu entreprenis la versigadon de ĉi tiu kroniko de antaŭ-islama kaj legenda Persujo estis Mansur-ebne Ahmad Dagigi de Tus, poeto ĉe la kortego de la samanidoj (847-903 p.K.). La kialo estis la deziro de Nuh-ebne Mansur, kiu surtroniĝinte kiel samanida reĝo, ege sopiris kreigi historion de siaj prapatroj en verson. Tamen Dagigi murdiĝis per sia sklavo post kompletigado de nur 1000 versoj. Bonŝance Dagigi-a milopa versaro atingis al Ferdoŭsio. Ĉi tiuj versoj, kiuj pritraktas ankaŭ la alvenon de la profeto Zoroastro, estis poste inkluzivitaj per Ferdoŭsio, kun ŝuldigaj agnoskoj en la novaj poemoj de li mem. Kiel tie diras Ferdoŭsio, la Dagigi-a parto kovris la historion ekde Goŝtasp ĝis Arĝasp.

Motivoj por Krei Ŝahnameon

Kiel dirite, Nezami skribis ke Ferdoŭsia motivo por enversigi Ŝahnameon, estis provizi indan doton por sia ununura filino. Tamen, aliaj verkistoj diris pri aliaj motivoj.

Laŭ Ŝebli Nomani – kiu i.a. rakontis pri sonĝo de la patro de Ferdoŭsio, kio interpretiĝis kiel poetiĝo estonta de la filo kun mondfamo – Abol-Gasem junaĝe decidis poemigi la historion de la persaj monarkoj, ĉar

li taksis sin el la posteoluj de zoroastranoj, kies religion kredis la antaŭ-islama Irano. Eble la plej granda vera motivo de Ferdoŭsio por poemigado kaj tiele eternigado de la Ŝahnameo estis – kiel fakte ja okazis – restarigado de la persa lingvo, kaj pere de la lingvo unuecigi irananojn, kaj donaci al ili ilian historian identecon komunan en bela formo parkeriginda kaj sin-disvasiganta. Nun eble troviĝas neniu iranano, kiu ne scias parkere almenaŭ kelkajn versojn de la verko. Ili reklamemas la belversojn fiere kaj naciece.

Grava karakterizaĵo de Ferdoŭsio kaj lia verko estas tio, ke dum la tempo, kiam la araba lingvo estis konata kiel la ĉefa lingvo de scienco kaj literaturo, li uzis preskaŭ nur la persan en sia majstraĵo. Kiel Ferdoŭsio mem diris:

"Pere de la pura persa, mi vivigis la persarojn."

Kun Ŝahnameo ĉe la Sultanon

La Ŝahnameo, fine kompletigita ĉ. 1010 p.K., estis prezentita al la konata sultano de gazneida dinastio (962-1186), nomata Mahmud Gazneida (r. 998-1030), kiu ĝis tiu tempo jam faris sin la mastro de Ferdoŭsia patrio, Ĥorasano. Informoj pri la rilatoj inter la poeto kaj li estas plejparte legendaj. Laŭ Nezami, Ferdoŭsio venis al Gazneo (ĉefurbo de gazneidoj, kaj deven-vorto de ilia dinastinomo) persone kaj pere de bona kabineto de la ministro Ahmad-ebn-Hasan Mejmandi (m.1032 p.K.) povis certigi la akceptiĝon de la poemaro per la sultano.

Tamen, tuj poste Mahmud ŝanĝis sian opinion. Pri la kaŭzo de lia opini-ŝanĝo ekzistas diversaj klarigoj. I.a. iuj diras ke lia bufono, Ajazo kaŭzis tion kalumniante ĉe li kontraŭ Ferdoŭsio. Aliaj diras ke tiam Mahmud konsultis certajn personojn - kiuj estis malamikoj de la ministro - pri la rekompenco por la poeto. Nezami aludas ke ĉirkaŭuloj de Mahmud parolis kontraŭ religia kredo de Ferdoŭsio kaj diris, ke al Ferdoŭsio devus esti donitaj nur 50,000 derhamoj, kaj eĉ ĉi tiom, ili diris, estis tro multe por li! Mahmud, estis influita per iliaj vortoj, kaj fine Ferdoŭsio ricevis nur 20,000 derhamojn. Amare malkontentigita, li iris en banujon kaj, elvenante, aĉetis trinkaĵon kaj dividis la tutan monsumon inter la banujisto kaj la vendisto de la trinkaĵo!

Al Alia Regnestro

Evitonte la sultanan koleriĝon, Ferdoŭsio foriris unue al Harato (en nuna Afganio), kie li estis kaŝita dum ses monatoj, kaj poste, tra sia naskiĝloko Tus, al Mazandarano, kie li rifuĝis ĉe la kortegon de la Sepahbod Ŝahrijar (-ebne Ŝervin-ebne Rostam), kies familio ĝuis devenon de la lastaj sasanidaj ŝahoj (226-636 p.K.), kiel Jazdgerdo. Tie Ferdoŭsio verkis satiron da 100 versoj kontraŭ sultano Mahmud, kion li enigis en la antaŭparolon de la Ŝahnameo kaj legis ĝin por Ŝahrijar, kaj samtempe proponis al li dediĉi la verkon al li, kiel posteulo de la antikvaj reĝoj de Persujo, anstataŭ al Mahmud. Ŝahrijar, tamen, persvadis lin lasi la verk-dediĉon al Mahmud, kaj pagis al li por ĉiu verso de la satiro po 1000 derhamojn, kaj tiel forigis la satiron el la antaŭparolo de Ŝahnameo. Tamen – laŭ Nezami – 6 versoj de la satiro postrestis, kiuj portas ĉiujn markojn de aŭtentikeco. Patro de Mahmud fakte estis sklavo unue, kaj tial Ferdoŭsio poemis pri li jene en parto de la postrestintaj versoj de la satiro:

“La ido de sklavo povas fari nenion
Kvankam patro lia regadis al region’
Registaro de ŝaho certe ne estas bona
Se ne, tuj estus al mi inde sidlokodona
En prapatraro lia ne ekzistis grandeguloj
Do li ne povis aŭskulti pri l’ veraj fameguloj”

Laŭa Edzino

La edzino de Ferdoŭsio, certe estis laŭ li kaj lia ideo kaj ili ĝuis tre belajn rilatojn, ĉar la unua historio, kiun Ferdoŭsio enpoemigis, estis “Biĵano kaj Maniĵea”, kies rakontinto estis la edzino. En la enkonduko de la historio, Ferdoŭsio tre bele parolas pri tio.

Krome, edzino, kiu ĉion preparis por komforto de la edzo ĉu materiale ĉu mense, kaj senplende lasis sian edzon perlabori nenion por 30 jaroj, nur verkante idealen, kaj kontentigis sin per pli simpla vivmaniero materia, ne povus havi plej etan kontraŭecon al la granda laboro de la edzo kaj li mem.

Tragika Forpaso

Laŭ la rakonto de Nezami, Ferdoŭsio forpasis tre malĝustatempe, t.e. ĵus kiam sultano Mahmud estis firme decidinta kompensi sian nejustan traktadon rilate al la poeto per sendado de 60,000 derhamoj kiel donaco. Kiam la kameloj surportantaj la donacon de la sultano eniris tra la Rudbar-pordego, la kadavro de Ferdoŭsio estis eliranta tra la pordego. Nek la filino de Ferdoŭsio akceptis Mahmudan donacon. Kiam li informiĝis pri tio, ordonis elspezi la monon por starigi *Rebate Ĉahe* (karavanejo-gastejo Ĉahe) ĉe Tus.

Nezami ne menciis la daton de Ferdoŭsioa

forpaso. La plej frua dato transdonita per posteuloj estas 1020 kaj la plej lasta 1026 p.K.; plejeble li vivis pli ol 80 jaroj.

Sennombraj Laŭdoj

Multaj iranaj kaj neiranaj esploristoj jam verkis pri Ferdoŭsio laŭdegante lian karakteron kaj vivoverkon. Mondskale, ekz-e, laŭ la internacia kunveno okaze de la 1000-a datreveno de Ferdoŭsio en Tehrano en 1934, Ŝahnameo rekoniĝis kiel ano de kvaropo, kies aliaj tri estas Iliado de Homero, La Dia Komedio de Danteo kaj Verkaro de Ŝekspiro. Iranoskale , laŭ M.A. Forugi, Ferdoŭsio apartenas al kvaropo, kies aliaj membroj estas geniuloj Rumio, Sadio kaj Hafezo.

Laŭ prof. Theodor Noeldoke, kiu plenumis profundan esploradon pri naciaj epopeoj de Irano, kaj verkis libron titolita La Nacia Epopeo de Irano, “Tiu ĉi nacia epopeo (Ŝahnameo) estas tiel grandioza, ke neniu nacio sur la tero havas similan al ĝi.”

Jen kion diris prof. Cowbell pri Ferdoŭsio kaj lia verkego:

"Aŭgusto (Augustus) diris ke li trovis Romon en briko, kaj forlasis ĝin en marmoro, kaj Ferdoŭsio trovis sian landon preskaŭ sen literaturo, kaj forlasis ĝin kun poemo, kiun ĉiuj postaj poetoj povis nur imiti kaj neniam superi, kaj kiu, efektive, povas rivali kun ĉiuj poemoj eĉ en iliaj strangaj stiloj, kaj eble elstaras tiel unika en Azio, kiel epopeoj de Homero en Eŭropo ... Lia versigado estas rave melodia, kaj neniam interrompiĝas per severaj konstru-formoj, kaj la poemo daŭriĝas de la komenco ĝis la fino, kiel rivero, kun nerompita fluado de harmonio.”

FONTOJ:

Nezami Aruzi, *Ĉahar Magale* (Kvar Artikoloj), (red.) D-ro Z. Safa, Tehrano: Amir-Kabir, 1983 (10-a eld.), 39 p., p. 33-39.
Mohammad Ravaji (Red.), *Bar Ĉekade Ŝahname* (Sur la Montopinto de Ŝahnameo), 5 rakontoj elektitaj el Ŝahnameo, Tehrano: Nahid eldonejo, 1992, 407 p., p. 9-19.
www.iranchamber.com/literature/ferdowsi/ferdowsi.php


Far majstro Mahmud Farŝĉian

Donu verŝistin'
el eterna vin'
ne trovota en paradizo
Apud Roknabad rivereto
kaj la ĝardenon preĝejan

بده ساقی می باقی که در جنت نخواهی یافت

کنار آب رکن آباد و گلگشت مصلی را

Hafezo

tradukita de d-ro K. Sajjadpur

Majstro Mahmud Farŝĉian naskiĝis en 1929 en Esfahano. Liaj familianoj ĉiuj estis arto-ŝatantoj. Dum kelkaj jaroj li estis studento de elstaraj tiamaj art-majstroj kiel Haĝ Aqa Mirza Aqa Emami kaj Issa Bahadori. Post kompletiĝo de siaj studoj en esfahana artlernejo, li vojaĝis al Eŭropo studonte pri la verkoj de la famaj okcidentaj artistoj.

Li ricevis sian unuan medalon artan kaj kulturan de Irana prezidento la 3-an de Julio, 1995. Prezentante ravajn kaj aŭtentikajn iranajn artaĵojn, li akiris internacian famon. Ĝis nun li gajnis multajn internaciajn premiojn kaj liaj verkoj estas parto de multaj artkolektoj tra la mondo. Ni prezentos kelkajn liajn artaĵojn ĉinumere.

Fonto: http://www.iranonline.com/art/farshchian/

La versoj de Ŝahname

Kejhan Sajjadpur

Je la nomo de Dio de l' vivo kaj menso
ke pli supre ol tio ne pasas la penso,
Dio de l' univers' kaj turniĝanta ĉiel',
Briliganto de l'suno, luno kaj matenstel'.

بنام خداوند جان و خرد　　کزین برتر اندیشه برنگذرد
خداوند کیهان و گردان سپهر　　فروزنده ماه و ناهید و مهر

Per la supraj versoj komenciĝas la epopea ĉefverko de la persa lingvo, Ŝahnameo, verkita de granda majstro de la persa poezio, Ferdoŭsi. La libro aranĝiĝis laŭ la regadperiodoj de iranaj antikvaj reĝoj, la plej amplekse restinta parto de la prahistorio. La unuaj reĝoj en Ŝahname, ekzemple Kiumars, Zahak kaj Ferejdun, ŝajne estas mitaj kaj oni ne scias ĉu ili vere ekzistis aŭ ne. Ferdoŭsi mem diras ke li verkis sian libron laŭ la rakontoj de aliaj homoj. Iom post iom aperas en Ŝahname historie dokumentitaj reĝoj kaj la libro finiĝas per la invado de la islama armeo al Irano.

Fariĝinte venkinto de l' mond', Ferejdun
krom sin kiel reĝon akceptis neniun.
Oni faris por lia kap' pompan kronon
kaj por lia ŝaha[1] palac' grandan tronon.
Benitan tagon komence de Mehr-monat'[2]
kiel reĝo li solene iĝis kronat'.
Li ordonis ke oni estigu fajron,
Ĉiu ĵetu en ĝi safranon kaj ambron.
Li vivadis en la mondo jarkvincenton,
Eĉ tagon li ne faris misfundamenton.

فریدون چو شد بر جهان کامکار　　ندانست جز خویشتن شهریار
برسم کیان تاج و تخت مهی　　بیاراست با کاخ شاهنشهی
بروز خجسته سر مهرماه　　بسر بر نهاد آن کیانی کلاه
بفرمود تا آتش افروختند　　همه عنبر و زعفران سوختند
ورا بد جهان سالیان پانصد　　که نفکند یک روز بنیاد بد

Ankaŭ troviĝas rakontoj pri rilatoj plejofte malamikaj inter la persaj ŝahoj kaj iliaj najbar-landaj reĝoj.

Forkurante kun vizaĝo sulkoplena
li iris senhalte ĉe la hano ĉina. (a)

گریزان و رخسارگان پر زچین　　همی رفت تا پیش خاقان چین

Sed la plejmulto de la libro temas pri grandaj herooj kiel Rostam, Sohrab, Afrasiab, Esfandiar, kaj Biĵan, kaj iliaj bataloj, venkoj kaj malvenkoj. Sendube la plej elstara kaj rakontita inter ili estas Rostam, kies sep obstakloj famas.

Al tiu, kiu kontraŭ Rostam batalas,
la kapo facile de la korpo falas.
Eĉ elefanto por li ne estas rival',
Eĉ Nilon devancas lia rapida ĉeval'.
Lia korpo kiel cent fortuloj fortas,
Lia kapo pli ol altaj arboj altas.
Dum batalo se li fariĝas kolerant',
sekuras nek leon' nek vir' nek elefant'. (b)

Apud la maldelikataj temoj, Ferdoŭsi ankaŭ skribis pri romantikaj anguloj de la vivo. Inter amaj aventuroj, tiuj inter Biĵan kaj Maniĵe, kaj inter Rostam kaj Tahmine estas pli famaj.

Al la tend' de tiu kara bravulino
li piediris kun esper' en la sino.
Tiu cipres'[3] malfermis la tend-kurtenon
metinte sur la tali' oritan zonon.
Maniĵe brakumis lin veninte ĉe li,
demetis reĝan zonon el lia tali',
kaj demandis pri l' vojo kaj karavano
"El heroar' batalis vin kiu ano?"
"Viajn vizaĝon, gloron kaj korpon kial
vi turmentas, ho mia bela, dum batal'?"

سوی خیمه دخت آزاده خوی　　پیاده همی گام زد به آرزوی
بپرده درآمد چو سرو بلند　　میانش بزرین کمر کرده بند
منیژه بیامد گرفتش ببر　　کشاد از میانش کیانی کمر
بپرسیدش از راه و از کاروان　　که با تو که آمد به جنگ از گوان
چرا اینچنین روی و آن فر و برز　　برنجانی ای خوبچهره بگرز

La rakonto pri Rostam kaj sia filo Sohrab estas la teragedia kulmino de Ŝahname. Sohrab estis la filo de Rostam kaj Tahmine. Rostam ne vidis lin ekde lia

naskiĝo, ĝis kiam Sohrab siavice fariĝis forta heroo. Okazis batalo inter Rostam kaj Sohrab sen ambaŭflanka scio pri ilia familia rilato kaj dume Rostam mortigis sian filon, nur poste eksciante ke lia mortinta rivalo estis lia filo.

Kiel mi ne troviĝas homarano,
Kompare kun li, mi estis infano.
Kiel ĉe lia patrin' mi sopiru?
Kiel mia kurier' al ŝi iru?
Per kies patr' okazis tia krimo?
Mi indas nun je ĉies malintimo.
Monde kiu mortigis sian filon
junan, inteligentan, bravan ulon?

چو من نیست در گرد کیهان یکی   به مردی بدم پیش او کودکی
چه گویم چو آگه بود مادرش   چگونه فرستم کسی را برش
کدامین پدر هرگز این کار کرد   سزاوارم اکنون به گفتار سرد
به گیتی که کشت فرزند را   دلیر و جوان و خردمند را



Iranstila desegnaĵo far majstro Farŝĉian rilate al batalo inter Rostam kaj Sohrab

Se la okazo estis oportuna, Ferdoŭsi ĉiam profitis tion esperimante valorajn maksimojn por ni. Liaj maksimoj post pli ol mil jaroj estas freŝaj kaj povas gvidi nin dum la vivo kiel torĉo.

Kiam rapido de l' cerbo altas,
Oni parolas multe sed stultas.

کسی را که مغزش بود پر شتاب   فراوان سخن باشد و دیریاب

Ne ĝenu grajno-portan formikaĉon
ĉar ĝi vivas kaj ĝuas vivo-plaĉon.

میازار موری که دانه کش است   که جان دارد و جان شیرین خوش است

Sen komenca rigard' al la tasko
vi puniĝos fine pro fiasko.

به آغاز اگر کار خود ننگری   بفرجام ناچار کیفر بری

La fino de l' batal' jene estas:
Unu tristas kaj alia festas. (b)

Generalo kiu vivi amas
dum milito nek venkas nek famas. (b)

Jen estas la leĝo de la sorto
ĝi fortas malgraŭ via malforto. (b)

Aldone al aliaj temoj, oni alfrontas al versoj prinaturaj en Ŝahname kiuj tre lerte kaj sperte priskribis nian mondon kaj ties karakterizaĵojn.

Pro l' nokto, la mond' kiel korvo-plum' nigris,
Lampo tiam de malantaŭ monto migris.
Kvazaŭ sur la blua kupolo de ĉiel'
La sun' etendis aron da flava juvel'.

جهان از شب تیره چون پر زاغ   همانگه سر از کوه بر زد چراغ
تو گفتی که بر گنبد لاجورد   بگسترد خورشید یاقوت زرد

Kaj fine troveblas versoj en la libro temantaj pri la celoj de la verkinto kaj liaj penoj dum tridek jaroj por revivigi la persan lingvon tiam minacatan de la araba.

Detruiĝas staranta forta kastelo
per la pluvado kaj per la suna brilo,
Kastelegon mi mansonis el poezio
ne detrueblan de vetero-vario.
Tridekjare mi penis por ĉi-verk' versa,
Persojn mi revivigis per tiu persa.

بناهای آباد گردد خراب   ز باران و از تابش آفتاب
پی افکندم از نظم کاخی بلند   که از باد و باران نیابد گزند
بسی رنج بردم در این سال سی   عجم زنده کردم بدین پارسی

Mi jam ne mortos ĉar eternos mia vivo,
Tial ke mi dissemis grajnojn de la lingvo.

نمیرم از این پس که من زنده ام   که تخم سخن را پراکنده ام

Rimarkoj:
1- Ŝaho estas la titolo de iranaj reĝoj.
2- Mehr estas la 7-a monato de irana kalendaro, kiu komenciĝas la 22–an de septembro kaj finiĝas la 21–an de oktobro.
3- Cipreso en la persa ofte estas la simbolo de alta staturo.

Fontoj:

a- Kejhan Sajjadpour. Irana Ĉinujo. Pajam-e Sabzandiŝan: printempo 2003, numero 3, paĝo 8.
b- Keyhan Sayadpour, Djavad Kamali. Ferdosi, la poeto paradiza. Literatura Foiro: oktobro 1990, numero 127, paĝoj 19-21.
c- Ŝahname de Ferdoŭsio, la kompleta teksto. Behzad eldonejo, 2004, Tehrano.

Zamenhof kaj Ferdoŭsio

Ahmad Reza Mamduhi

Se majstro Abol-gasem Ferdoŭsio (940?-1020?), pli ol mil jarojn antaŭe – kaj ĉe zenita regado de la araba lingvo super Persujo – ne komencus sian kultaran defion kaj ne ekkreus Ŝahnameon kaj tiel ne kaŭzus renaskiĝon kaj ekfloradon de la persa lingvo - plejeble nun ni, irananoj, parolus arabe! Ankaŭ hodiaŭ – kulmine de la hegemonio de la angla lingvo super la mondo – se ni ne temigu kaj ne antaŭenigu logikan, internacian kaj neŭtralan lingvon kiel Esperanton, ankaŭ niaj gepranepoj suferos de la fremda lingvo (kiel) angla kaj ties kulturaj kaj sociaj postsekvaĵoj.

Samkiel Ferdoŭsio mem elokvente esprimis en poemo, li pasigis tridek jarojn de sia kara vivdaŭro por kreado de Ŝahnameo – kio i.a. garantiis renaskiĝon de la persa lingvo - ankaŭ Zamenhof, ekpost la eldoniĝo de Esperanto en 1887, ankoraŭ dediĉis precize tridek jarojn de sia vivo – fakte ĝis la fino de la fruktoplena vivado - al tradukado kaj verkado de pli ol 50 diversaj libroj, kio neimageble maturigis kaj riĉigis la novan lingvon.

Enkonduko

Kion grandioze Ferdoŭsio faris por Irano kaj irananoj per kreado de Ŝahnameo, multrilate komparindas kun tio, kion Zamenhof plenumis perfekte por la mondo kaj mondanoj pere de iniciato de Esperanto. Tiu ĉi artikolo tre koncize aludas al iom da similecoj inter Zamenhof kaj Ferdoŭsio kaj iliaj ĉefverkoj, la epopeo Ŝahnameo kaj la internacia lingvo Esperanto.

Restivoj de Ŝtona Palaco kaj Kultura Palaco

La logiko kaj la kialoj, kiujn Ferdoŭsio en kelkaj mallongaj versduoj tiel bele kaj koncize esprimis pri sia vivocelo kaj ambicio, eĉ hodiaŭ, post pasado de dek jarcentoj, ankoraŭ estas akceptindaj kaj konvinkaj por la nuntempa homo:

Prosperaj konstruaĵoj detruiĝos iam fine,
Sekve de la pluvadoj kaj celitaj sunradie.
El poezio mi fundamentis por alta palaco,
Kiun neniel damaĝos la ventoj kaj la pluvado.
Kiom longe mi suferis tiujn ĉi tridek jarojn,
Pere de la pura persa, mi vivigis la persarojn.
De nun poste mi ja ne mortos plue vivanta
Ĉar estis ade la parolsemojn disĵetanta.

Jes, en la histori-konscia rigardo de Ferdoŭsio, sen ĉia dubo “Prosperaj konstruaĵoj detruiĝos”, do li utiligas sian tempon por elkonstrui palacon restivan, “Kiun damaĝos nek la ventoj nek la pluvado”, kaj tio ne estas krom palaco de “poezio”, kies fundamento estas en la koroj kaj sinoj de la popoloj, kaj kies ekziston protektas la publiko. Do ĝis kiam la popoloj ekzistas, ankaŭ la palaco starantos: veraĵo, kiun nenia realaĵo povas defii.

Fakte, fizikaj konstruaĵoj, malgraŭ siaj laŭŝajnaj beleco kaj fortikeco, estas realaĵoj detruemaj kaj pereemaj, dum la kulturaj verkoj originalaj, estas veraĵoj restemaj, restivaj kaj nedetrueblaj, ĉar ili estas pli rezistaj kontraŭ la naturaj fenomenoj kaj katastrofoj, konserviĝante funde de la koroj de popoloj. Pro tio la plejmulto de arkitekturaj majstraĵoj de la mondo – inkluzive la strangan sepopon mondan – jam pereis, kaj eĉ la malplejmulto de arkitekturaĵoj, kiuj restis ĝis nun, neniel konservis sian unuatagan grandiozon kaj brilon.

Tamen plejmulto de la mondaj literaturaj gemoj bone konserviĝis ĝis hodiaŭ kaj ankoraŭ ĝuas sian unuan allogon: gazalaroj de Hafezo (1320-1389) kaj Rumi (1207-1273), kaj la eterna epopeo Ŝahnemeo kaj la riĉega internacia lingvo esprimiva Esperanto, estas nur kelkaj ekzemploj el miloj da beletraj kaj kulturaj verkoj, kiuj hodiaŭ estas en nia dispono – kaj tre interesas ke ilia ekzisto kaj ĉeesto nun, ĉu fizike en la formo de libroj kaj eldonaĵoj, ĉu spirite en la mensoj kaj koroj de la homoj, eĉ estas pli ol tiom, kiom estis en la pasinteco, kaj verŝajnas ke ju pli multe pasas

de ilia naskiĝtempo, des pli funde konatiĝas ilia profundeco kaj valoro al la homoj!

Didiĉi Vivdaŭron al Ideo
Samkiel Ferdoŭsio mem elokvente esprimis en poemo, li pasigis tridek jarojn de sia kara vivdaŭro por kreado de Ŝahnameo – kio i.a. garantiis renaskiĝon de la persa lingvo - ankaŭ Zamenhof, ekpost la eldoniĝo de Esperanto en 1887, ankoraŭ dediĉis precize tridek jarojn de sia vivo – fakte ĝis la fino de la fruktoplena vivado - al tradukado kaj verkado de pli ol 50 diversaj libroj, kio neimageble maturigis kaj riĉigis la novan lingvon. Ankaŭ Zamenhof en bela kaj imagoplena poemo esperantlingva nomata Mia Penso, i.a. diras pri sia juneco, kion li pasigis por Esperanto. Jen ĝia fragmento:

Mia penso kaj turmento,
kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan –
la junecon – mi ploranta
metis mem sur la altaron
de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
vivi ankaŭ mi deziras, –
io pelas min eterne,
se mi al gajuloj iras...

Pioniroj de Nacia kaj Internacia Kulturoj
Majstro Abol-gasem Ferdoŭsio per verkado de eterna epopeo Ŝahnameo, krom la grandega transformiĝis en naskiĝejon kaj komunikilon por supernaciaj pensoj kaj ideoj homaj kaj pacamaj tra la tuta mondo. Samkiel William Auld (1924-), fama skota verkisto kaj poeto en Esparantio, kiu ĝis nun dufoje kandidatiĝis por la literatura Nobel-premio, diris, la naciaj kulturoj estiĝas kaj identiĝas surbaze de ekzistantaj **diferencoj** inter diversaj hom-grupoj, dum la supernacia kulturo de Esperanto naskiĝis kaj karakteriziĝas per **komunecoj** inter ĉiuj homoj de la mondo. Alia rimarkinda punkto, kiun prialudas Auld ĉirilate, estas la tamena harmonio inter tiuj ĉi du diversspecaj kulturoj, tiel ke sama homo apartenanta al sia nacia kulturo, povas partopreni ankaŭ en la vasta supernacia mondkulturo kaj dediĉi sian nacian kontribuaĵon al la internacia kulturo kaj utiligi ĝin reciproke (La Fenomeno Esperanto, Rotterdam: UEA, 1988, 120 p., p. 97-99).

Nacia Lingvo: Okazo kaj Minaco, Libero kaj Limigo
Ĉiu nacia lingvo disponigas al sia parolanto okazon kaj liberon kaj samtempe minacon, limigon kaj malliberejon: ĝi donas okazon ĉar ties parolanto povas utiligi ĝiajn fontojn kaj prezenti al la publiko sian kreivon en la lingvo; kaj ĝi estas minaco ĉar ties skalo estas nur tiom vasta kiom ĝia geografia amplekso. Sekve, tiu, kiu nur kadre de sia nacia lingvo legadas, verkas kaj vivas, kvankam ĝuas ties sennombrajn gracojn kaj eblecojn, tamen senigas sin je miriadoj da gracoj apartenantaj al la kulturoj kaj civilizacioj de la resto de la mondo.

Pere de la persa lingvo kaj tra Ŝahnameo, Ferdoŭsio kaŭzis unueciĝon de la lando Irano kaj donacis komunan identecon al ĉiuj irananoj kreante pozitivan naciismon inter ili. Helpe de Esperanto, kaj ĝia internacia kulturo, Zamenhof ekkreis unueciĝon de la tuta mondo kiel unu interdependa tutaĵo akcentante sur tre komunaj kaj similaj ecoj inter ĉiuj mondanoj, naskigante veran internaciismon en la homajn korojn.

kontribuo al revenigado kaj revivigado de la persa, kaj ties ĝisebla starigado kaj plifortigado, ankaŭ estigis radike profundan kaj potencan (mem)konscion inter irananoj, kio kondukis al ekflorado, disvolvo kaj disvastigo de naciemo en tre vasta regiono de Irano. Ankaŭ doktoro Zemenhof pere de iniciato de internacia lingvo Esparanto, aldone al prezentado de komuna kaj neŭtrala lingvo por ĉiuj homoj de la mondo, kreis firman fundamenton por plialtigo de diversaj internaciaj rilatoj tuttere, for de ĉia diskriminacio kaj fanatikeco. Esperanto

Ene de la nuntempa civila socio, ĉiu el ni, apartenas kaj al nia familio kaj parencaro, kaj al nia socio. Same aŭ simile, en la nuna erao de internacia komunikado kaj informado, ni devas krom al nia nacio, aŭ nacia socio, aparteni ankaŭ al la monda civila socio – kaj Esperanto, kiel vera internacia kaj neŭtrala lingvo, jam pruvis ke ĝi povas esti la ĉefa akso por tia ĉi celo.

Senigi Sin de Materialaĵoj pro Spiritaĵoj
Ferdoŭsio kaj Zamenhof profunde sciis kaj kredis ke spiritaĵoj estas pli valoraj kaj pli

restemaj, ne materialaĵoj. Ĉiu el ili, depende de kondiĉoj kaj cirkonstancoj de sia tempo, kaj laŭ siaj bontrovoj, konstatoj kaj interesoj, pasigis plejparton de sia vivdaŭro por la spiritaĵoj.

Certe se Ferdoŭsio dezirus havigi al si oficon, riĉaĵon kaj "prosperajn konstruaĵojn", li povus tion fari tre facile pere de sia eksterordinara talento kaj poema verkivo, laŭdegante ragantan regnestron aŭ reĝon – kaj por tion fari, li ne bezonus pasigi tridek jarojn de sia vivo. Sed, lia antaŭvidivo, profunda pensmaniero kaj homamo evitigis lin de tio - kion siavice povus fari, kaj fakte faris, ĉiu vulgara poeto de la tempo. Lin allogis pli vastaj sed pli foraj horizontoj. Ferdoŭsio – kiel ĉiu alia kreanto – pripensis tion, kio fakte ne ekzistis, tion, kion nur la penso kaj imago povus alproksimiĝi, ĉar laŭ principo bele esprimita de Moŭlana (Rumi):

Penso via iras ien, poste tiras vin al tie,
Penson devancu, kaj sorteske, antaŭiĝu antaŭiĝu!

Laŭ iu klasifikado, popolamaso pensas pri tio, kion ili aŭdas, elito pri tio, kion ili vidas, kaj geniuloj pri tio, kion ili nek aŭdis nek vidis – nome pri tio, kio ne ekzistas en la ekstera mondo, kaj ili mem planas ekestigi ĝin.

Se ankaŭ Zamenhof nur pensus pri sia ĉiutaga materia vivo – precipe en la mizera etoso de la 19-a jarcento, kaj kun sia relative granda familio – li neniam kaj neniel ekpensus okupigi sin pri lingvo, kiu eĉ ne ekzistis! Li tre facile povus utiligi sian genion kaj tempon por enspezado, kaj tiele estigi pli bonan staton materialan por si kaj sia familio, sed lia forta kaj foren-rigarda vidkapablo, lia kre-soifa sinteno, kaj liaj amo kaj angoro pri la homaro – kio siavice eĉ kaŭzis al li ŝanĝi sian fakon kaj laboron - eĉ momente ne lasis lin perdi sian klarvidon kaj komprenivon cele al la prosperigo de la homa socio mondskale. Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj de la tiama cara Rusio, li neniel lasis sin trafiĝi per la ĉiutageco kaj sintruda tempo-mortigo, kio superregis la socion.

Li ankoraŭ restis fervore fidela al siaj tiom futuremaj ideoj kaj idealoj progresemaj. Kiel ni Esperantistoj, multfoje kaj plurrilate elsentis, kion Zamenhof iniciatis jam pli ol cent jarojn antaŭe, kaj kion li tiel bone maturigis tiam tre detale varkante pli ol 50 librojn, eĉ nuntempe, en la 3-a jarmilo kristana, kaj en la erao de komunikado kaj interreto, ankoraŭ ŝajnas ne-ebla, noveca kaj antaŭtempa al mutaj el niaj samtempanoj!

Nuntempaj Esperantistoj: Sindonemaj Adeptoj de Zamenhof

Ankaŭ en la nuna tempo ĉiuj Esperantistoj, kiuj sekvante sian majstron Zamenhof, kaj malgraŭ ĉiaj ĉiutagaj problemoj de la vivo kaj socio, ankoraŭ pensas pri Esparanto kaj lernemas ĝin disvastigonte la lingvon kaj ties transcendan ideon – kaj tial eĉ celiĝas por mokadoj de la dronintoj en la abismon de ĉiutagaĵoj sociaj – fakte ĝuas pli vastan vidterenon kaj perspektivon relative al la aliaj: Esperantistoj preferas kaj jam elektis engaĝiĝi aktive en la plibonigado de la mondaj cirkonstancoj, al la pasiva akceptado de la estantaj kondiĉoj misaj.

Eble estas pro tio, ke laŭ la esploro plenumita en Germanio, la meza vivo-daŭro de la Esperantistoj estas pli longa ol aliaj membroj de la socio. Sendube ĝui ĝustan kaj pozitivan ideon kaj idealon kaj ĉiam klopodi por atingi tion, plibeligas la vivon de Esperantistoj, kaj donas al ili pli da movaj motivoj por la vivado. Same kiel pens-stagnado kaj ripetado de malnovaj kliŝoj malĝustaj povas malfortigi la homan spiriton kaj korpon, ankaŭ havado kaj ĝuado de alta kaj valora celo – kiu se atingita, povos tre pozitive kaj konstrue ŝanĝi bonen ĉiujn rilatojn kaj ordojn regantaj nun super la homa mondo – kapablas donaci al la homo esperon kaj sopiron bonefikante sur la menso kaj korpo de la homo, plifortigante lin.

Kiam anglalingvano, kiu nur per instruado de sia patrina lingvo, povas tre komforte akiri multon materiale, tamen preferas instrui Esperanton – kaj multam senpage - aŭ kiam franco anstataŭ verki en sia nacia lingvo, okupigas sin por verki en Esperanto – por malpli multa legantaro momente – certe oni povas juĝi ke ili jam senigis sin de la ĉiutagaj kaj frue-atingeblaj plezuroj furoraj en la socio, kaj alkudris sian rigardon al pli foraj kaj pli malfruaj celoj kaj atingaĵoj – sed samtempe pli noblaj kaj pli humanaj.

Ne Bonvenigo Flanke de la Ŝtatoj de la Tempo

Samkiel la regantoj de la tempo (precipe sultano Mahmud Gazneida) vole-nevole ne konstatis la grandecon de la ĉefverko de Ferdoŭsio kaj ne aprezis ĝin kaj ĝian genian verkinton tiel inde, kiel endus, ankaŭ la ŝtatoj de la Zamenhofa tempo (fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj), ne komprenis la altvaloron de lia kuraĝa kaj revolucia

iniciato, kaj ne bonvenigis Esperanton kaj ĝian kreinton, tiel, kiel ili meritus. Sed, feliĉe en ambaŭ kazoj, la popoloj mem, tre inde, ĝuste, kaj juste bonvenigis tiujn ĉi du geniulojn kaj ties atingaĵojn, kaj tiele fakte Ŝahnameo kaj Esperanto konserviĝis kaj disvastiĝis nur pere de popoloj, kaj ilia populareco plialtiĝis jaron post jaro. Rilate al Ŝahnameo, recitadoj de ĝiaj versoj kaj historioj de sino al sino, kaj transskriboj sennombraj; kaj pri Esperanto, verkado kaj eldonado de ties lernolibroj, vortaroj, periodaĵoj kaj aliaj eldonaĵoj, kaj fondado de diverslandaj asocioj kaj kursoj pere de popoloj, estas tre konvinkaj pruvoj fortaj ĉi-rilate.

En hodiaŭa mondo de ĉiam pli-progresanta socio civila, kaj sekve de tio, plifortiĝo de la popola povo kaj prefero por antaŭenigado de ideoj, nun ankaŭ Esperanto pli vaste kaj pli grandskale temiĝas kaj subteniĝas pere de popoloj terglobe, kaj rezulte fakte jam aperis novaj esperoj en la koroj de la mondaj popolanoj por la fina kaj pli frua sukceso de Esperanto.

Disvolviĝanta Sukceso de Ferdoŭsio kaj Zamenhof

La alta nombro de diversaj presoj kaj eldonoj de Ŝahnameo en multaj lingvoj de la mondo, atestas pri disvolviĝanta sukceso de Ferdoŭsio. La granda nombro de persaj parolantoj ĉu en Irano ĉu en aliaj regionoj de la mondo, kaj sennombraj poetoj kaj verkistoj de la persa, kiuj jam ĝuis laŭdon de la mondo, certe kontentigus Ferdoŭsion pri sia 30-jara penado!

Ankaŭ diversspecaj kongresoj kaj kunvenoj pri Ferdoŭsio kaj lia ĉefverko, flanke de naciaj kaj internaciaj institucioj kaj organizoj – i.a. Unesko – elmontras la pravecon kaj mondiĝon de la ideo kaj laboro de Ferdoŭsio.

Ankaŭ pri Zamenhof kaj lia nepereema elpensaĵo, la Internacia Lingvo, presado, eldonado de multnombraj libroj kaj periodaĵoj tra la tuta mondo, kaj okazigo de miloj da seminarioj, paroladoj kaj kongresoj naciaj, regionaj kaj internaciaj – kaj nomado de jaro flanke de Unesko honore al doktoro Zamenhof, kaj aprobo de du rezolucioj favore al Esperanto dank' al ĝiaj jamaj atingaĵoj por la homaro – bone montras pri mondskala sukceso kaj akcepto de la elpensaĵo kaj iniciato de doktoro Zamenhof. ★

Mi deziras versi pri homo,
ĉie en persujo brilas kies nomo,
Kiu uzis el la viv' tridekjaron
verkante la plej valoran versaron.

Kiu per kreo de herooj fortaj,
kvankam ili ŝajnis nur vortaj,
kaŭzis revenon de l' memfido
forfluginta de ĉiu irana ido.

Kiu per rakonto de nia prahistorio,
miksante tion kun iom da fantazio,
kaŭzis vivadon de l' persa civili-
zacio
apud l' akceptita islama religio.

Kiu la persan lingvon savis
el suba rango kion ĝi havis.
Kiu per Rostam kaj Sohrab
distingis la person de l' arab'.

Mi diras pri Abol-gasem Ferdoŭsi,
la majstro de l' persa poezi',
Homero de Irano, honoro de



Rigardeto al la vivo kaj regmaniero de

Kuroŝo

la granda Suvereno justa

Gasem Aĥteh

Kuroŝo (Siruso aŭ Cyrus) la granda (ĉ.550-529 a.K.) nomiĝis per grekoj la estro kaj la leĝfaranto, per irananoj, la patro kaj judoj lin nomis Mesio (la savanto). Ĉi tio, troiga ne estas, ĉar efektive kaj vere li indas al tiaj rangoj, se oni observus tion kompare kun tuthoma historio kaj ties brilantaj vizaĝoj. Ĝuste tial Gzenofono (Xenophon ĉ. 430-354 a.K.) kredas lin kiel modelon por grekoj. Multaj homoj ĉu pratempe ĉu nuntempe, ĉu amikoj ĉu malamikoj konfesis pri lia politika bonkonduto, liaj mirige interesaj pensoj en regado, kaj liaj aplikitaj principoj en administrado, pri lia modereco kun la popolo, gentoj kaj diversaj nacioj. En la erao antikva, Herodoto, Gzenofono,Tosidido, Plutarko, Plato, Aŝilo, kaj en erao nuna okcidentaj historiistoj kiel Harold Lahabo, Napoleono, Hegelo, Vil Durant, nobeluloj judaj kiel Amaja, Aŝaja, Danielo, islamaj historiistoj kiel Tabari, Masudi, Biruni, Hamzeh Esfahani, kaj multaj aliaj, ĉiuj pri la moralo kaj altaj idealoj de Kuroŝo Haĥamaneŝa (Aĥemenida), specife pri la feliĉo, bonvolo kaj komforto rilate al popolo havas favoran opinion. Se ni enkondukus lin inter emiroj, reĝoj, ĉefkomandantoj, li estas unu escepto reĝistrita en la homa historio. Alivorte neniu alia reganto estas povinta lasi nomon tiom indan kiel la lian.

La politika konduto kun judoj babelaj aŭ venkitaj reĝoj kiel Astijak la reĝo de Mado, laŭdire lia avo, aŭ Krozuso reĝo de Lidio, liberigo de la primitivaj gentoj en la vesto de la Zolgarnejn (Dujarcentulo) estas aferoj citeblaj kaj admirindaj en la historio, kio malofte estas okazinta ĉe aliaj komandantoj.

Laŭ la opinioj de ĉiuj teoriistoj la regproblemoj kaj ĉiuj temoj rilatantaj al sekureco, bonfarto kaj homa ekzisto plene atestas al unu homo altranga speguliĝinta en la vizaĝo de tiu ĉi persa komandanto. Geniulo, kiu dum sia tuta vivo sekvis celon superan kaj sanktan. Li amanto de homeco, saĝo kaj filozofio estis persono decidema kaj honesta. Li povis alproksimigi kaj fascini al si la korojn de la homoj, tiel ke ĉiuj deziris havi reganton kiel lin.

Kuroŝo kutime diris: *"La reĝa konduto devas esti kiel mastro antaŭ sia servutulo".*

Naskiĝo kaj deveno de Kuroŝo

Li patrin-flanke, de madoj, kaj patre, de persoj devenas. La nomo de lia patrino estis Mandana kaj la patro nomiĝis Kambuĝije la dua, la filo de Kuroŝo la unua, kiu mem estis la filo de Ĉiŝpeŝo kaj ĉi tiu reĝo estis la filo de Haĥamaneŝo, la dinastikapo de arjaj persoj, kies trupoj apud partoj kaj madoj venis kaj loĝis en sudokcidenton de persujo. La arto de Kuroŝo la granda estis tio, ke li faris la persojn potencaj, famaj kaj grandiozaj kaj disvastigis ilian teritorion en la tutan Persujon kaj Azion.

La patrino de Kuroŝo, Mandana estis la filino de Aĵdehako la reĝo de mada gento. Tiu gento ariaj nevoj de persoj kiuj elektis nordokcidentan regionon de Persujo kiel sian regadejon kaj fondis la unuan registaron kaj fundamentojn de politika potenco en Persujo, tamen li tre rapide venkiĝis pro sagaco, politik-militista genio kaj pensmaniero de sia nepo (559 a.K.).

Laŭdire de Herodoto kaj Gzenofono kiel la plej proksima fonto al Kuroŝa erao kaj dokumentoj historiaj, li havis naskiĝon mistikan kaj infanaĝe post-vivis atencon, t.e. ke, kelk-tempe antaŭ la naskiĝo Aĵdehako alvokis sian filinon el Ŝuŝo al Hegmataneo, ĉar li dum du noktoj sinsekve sonĝis, ke el ventro de sia filino jam kreskis vito, kiu sternis tiom da branĉoj kaj folioj tra la tuta Azio kaj ankoraŭfoje li sonĝis, ke el ŝia

abdomeno fluis muĝanta rivereto, kiu inundis lian tutan teritorion kaj azian kontinenton. Laŭ la interpretistoj de la kortego de Mado tio signis, ke li baldaŭ estos venkita pere de sia nepo, kiu ne nur landon de Mado sed ankaŭ la tut-okcidenton kaj orienton de Persujo subregigos . Aĵdehako embarasite ordonis al sia ministro Harpakuso adekvate mortigi la ĵusnaskitan Kuroŝon, sed Harpakuso venĝema en la koro pro sia maljuste mortigita frato far



Aĵdehako, ne nur ne mortigis Kuroŝon, sed kreskigis Kuroŝon kaj li edukiĝis (589 a.K.) kaj 30 jarojn poste (559 a.K.) kiam la juna regnestro atakis al Mado, Harpakuso havis la plej gravan rolon en lia venko, do, Kuroŝo eĉ infanaĝe kun sia patrino travivis inter la Madoj sub regado de sia avo, la ĉefa malamiko, sed la sorto postulis lin vivi kaj esti la origino de grandaj evoluoj en la homa historio kaj plenumi gravajn agadojn.

Efektive oni povas konsideri la reĝan ŝtaton de Aĥemenidoj, la plej bonord-aranĝitan kaj sia-tipe la plej progresintan regad-organizon en la mondo, kiu ŝuldas tion al tag-nokta penado de granda geniulo persa. La ŝtato, kiu en ĉiuj kampoj, politika, socia, ekonomia kaj militista estis elstara en la historio kaj ĉi tiun progresintan kaj senmankan registaran organizaĵon Kuroŝo fondamentis kaj postlasis ĝin kiel heredaĵon altprezan, kiu ĉirkaŭ 250 jarojn (599-330 a.K.) estis brilanta gemo inter homaj registaroj.

Epigrafo starigita en la Kuroŝa maŭzoleo en Pasargado eldirita lia-lange estas jen:

"Ho pasanto, kiu ajn vi estus, el kie ajn vi venus, mi konscias, ke fine vi preterpasos ĉi lokon. Ĉi tiu estas mi, Kuroŝo, la granda reĝo, la reĝo de kvar anguloj de la mondo, la reĝo de landoj, ne enviu al et-tero min ĉirkaŭprenita, lasu min kaj pasu."

Tiu ĉi eldiraĵo evidentigas al ni la plian valoron de lia agado, ke li vere ne estis allogita al la mondo kaj ties regado. Ĉe Kuroŝo bontrakti servutulojn, justeco kaj egaleco inter ili sen-konsidere de iliaj gentoj kaj rasoj havis plian valoron ol ilin regadi. Ĉi tiu karaktero apud liaj aliaj ecoj distinigigas lin disde la aliaj regantoj. Tiel politika, militista manieroj kaj moralo elstara nur apartenas al Dujarcrntulo, kiu laŭ la konfirmitaj dokumentoj alkonformiĝas al karaktero kaj agaro de la reĝo aĥemena.

La Dujarcentulo

Laŭ la esploradoj historiaj, pruvoj kaj atestoj, tiuj de epigrafoj kaj malnovaj dokumentoj, neniu krom Kuroŝo povus esti la Dujarcentulo.

Iuj el la okcidentaj historiistoj jam kolopodis atribui ĉi tiun specifan econ al Aleksandro la macedona, tamen neniu el la apartaĵoj subaj konformas al liaj vivo kaj agaro, ĉar la vorto hebrea Dujarcentulo "posedanto de du jarcenta vivo" estas aplikita pri Kuroŝo kaj ankaŭ en sankta Korano en benita surao Kahf, la versoj 80-101 diskutas pri Dujarcentulo. Surbaze de komentarioj de grandaj entrepretistoj, tiuj ĉi apartaĵoj konformas al karakteroj de Kuroŝo, ĉar la Dio donis jam al li la potencon kaj progresrimedojn, por ke li starigu justecon sur la teron kaj savu la homon subpremitan.

Dujarcentulo por plenumi sian mision dian havis militvojaĝojn al okcidento, oriento, al loko sun-leviĝanta kaj -subiranta, al altoj de Kaŭkazo kaj sudo, eĉ ĝis Jemeno kaj Heĝaz-kamparo.

Kiam li laŭ peto de Saspirs-gentoj rapidis al Heĝaz-bordoj, li konstruis digon el fero kaj metalo, kiel obstaklon inter ili kaj sovaĝaj gentoj Jaĝuĝo kaj Maĝuĝo. Krome li konstruis



Kor-riveron kaj urbon je sia nomo en tiu regiono. Ankaŭ du flugiloj kaj du kornoj aldonitaj al statuo de Kuroŝo estas farita laŭ lia ordono en Pasargado (550-529 a.K.), kio estis menciita kiel unu el la simboloj de la Dujarcentulo . Entute ĉiuj liaj milit-celoj estas por efektivigi mision Dian. Se ni konsiderus lin en sankt-antikvaj tekstoj religiaj kiel la Biblio kaj Korano, li estus komisiito Dia. Ĉie Dio estas kun li kaj helpas lin kaj multaj dokumentoj konfirmas tion, kiuj ne citeblas ĉi tie.

Militoj de Kuroŝo

La eco distinga en militoj de la persa komandanto dis-de la aliaj historiaj komandantoj estas tio, ke li nur militis por liberigi la gentojn subpremitajn el regantoj dispotaj, disvastigi la egalecon kaj regigi individuojn respondecajn, kiuj almenaŭ iome juste kondutas kun siaj subuloj. Ĉi-aspekte Kuroŝo ricevis jam la titolon misiito Dia kaj glavon elingigis celante por bono kaj homa savo.

Kuroŝo en siaj militoj unue militis kun madoj, kontraŭ sia avo Astijak (559 a.K.), kiam li aĝis 30 jarojn kaj en Ŝuŝo la juna reĝo anstataŭ sia patro Kambuĝije la unua heredis la tronon. Li tuj translokigis la ĉefurbon al Pasargado, kampo plenverda. Sekve mesaĝon gravan li ricevis el Hagmetaneo, kiun Harpakuso la ministro de Astijak donis al Kuroŝo . La teksto jenis:

"Tuj pretiĝu ataki al Mad-regiono."

Kiam li alvenis al limoj de Mad-lando, Harpakuso kun Mad-trupoj grandnumbraj aliĝis al li kaj Kuroŝo post eta milito, venkis kaj estimoplene kunportis sian avon al Pasargado. Poste la Dujarcentulo atentis al okcidento de Persujo. Tie li unue renkontis Lidion. Krozuso la reĝo de Lidio multjare aliancano kun Nebopelsad (Nebonid, Babela reĝo) kaj Astijako la mada reĝo kontraŭis Persujon, sed vidinte la malvenkon de madoj, Krozuso timegis kaj eĉ anticipis ataki al Persujo, sed la genio kaj sperto de Kuroŝo la granda, neniam lin kaptigis surprize. Aliflanke Sardiso la ĉef-urbo de Lidio, kiu fabelan famon havis pro ornamaĵoj kaj por Kuroŝo estis kiel pordego al okcidentaj landoj, krome Kuroŝo volis puni Krozuson pro lia kruela traktado al popolo lidia.

Fine de aŭtuno 546 a.K., li atakis al Lidio. Kvankam li ne sukcesis en tiu atako, sed baldaŭ pro sia armea kaj strategia sperto reiris kaj en neĝa vintro malvarma sieĝis Sardon. La sieĝo ne longe daŭris, ankaŭ Krozuso malesperiĝis de helpa trupo babela. En dua milito Kuroŝo konkeris Sardon kaj kapitulaciigis Krozuson, sed la bonkonduto de ĉi tiu granda suvereno ne nur ne viktimigis lin, sed ankaŭ enmetis lin inter siaj konsilantoj. La regimento meharista multe helpis lin en tiu ĉi venko. Li baldaŭ venkis aliajn Satrapojn (guberniestrojn) okcidentan kaj grekan kaj malgrand-Azian, inter ili Kapadukieh, Antakije, Armanije, Fenigieje, Palestino, kaj…. ĝis 540 a.K. la tuto de ĉi tiu regiono venis sub teritoriojn de Aĥemena dinastio kaj ties granda komandanto.

Kuroŝo en Babelo

Nun venis la tempo por realiĝo de la antaŭdiroj de profetoj kaj judaj granduloj. Nebonid sekve de unu atako al Jerusalemo kaptis milojn da judoj kaj alportis ilin al Babelo kaj ili estis vivantaj en la plej malbona ebla situacio. Aliflanke Babelo estis urbo, kiu estis unika en populareco kaj graveco. Ĉi tiu urbo estis la bofilino de la mondo kaj koro de persa imperio kaj ties fuorto fortika estis farinta ĝin urbo ne venkebla. La militista genio de Kuroŝo en la venko de tiu urbo estis en tio, ke li ordonis al soldatoj devojigi la akvon de Forat-rivero kaj elfosante kanalojn sub la granda fuorto, dum unu nokto kiam babelanoj estis okupitaj en plezuro kaj diboĉado. Kvankam ili en pasintaj tagoj estis mokintaj la kanalfosadon far persoj li kaptis la urbon. Estis en jaro 539 a.K., kiam tiu okazaĵo granda realiĝis. En Babela konkero tio, kio elvekis la miron kaj surprizon de la pratempa

kaj hodiaŭa mondoj, estas la bonkonduto de Kuroŝo kontraŭ la venkitoj. La libro Biblio estas finita kun la nomo de Kuroŝo (Parto " tagaj historioj"). La dua parto de la libro Azra, ankaŭ komenciĝas per nomo de Kuroŝo. Efektive la brilanta agaro de Kuroŝo kulminas en Babela konkero, t.e., ke faras lin kiel persono supernacia, monda kaj mesio Dia (liberecdona kaj liberiganto) kaj pensulo pri justeco kaj libereco. Tia libereco, sur kies bazo plenumiĝis kaj garantiiĝis la ritoj, kredoj kaj relegiaj pilgrimoj de ĉiu gento.

Kuroŝo en oriento

Dum ses jaroj de 539 ĝis 546 a.K. post la konkero de Lidio ĝis la venko de Babelo Kuroŝo antaŭeniris en orientajn landojn. Saviganto t.e. (la Dujarcentulo) devus plenumi sian mision profetan. Rezulte dum ses ĝis ok jaroj li okupiĝis en fortigado kaj stabiligado de orientaj limoj de Persujo kaj disvastigis ilin, kaj nordon pasigis ĝis Sejhuno kaj Gejhuno (Amudarja kaj Sirdarja) riveroj kaj konstruis Kuroŝo urbon sur bordo de Sejhunrivero kaj en oriento ĝis Hindujo kaj Sendrivero li antŭeniris kaj aldonis la regionojn de Ĥorsano, Sogdo, Ĥarazmo, Parto, Harato (Hariveh), Baĥtarish kaj… al la persa teritorio. Kaj post tiuj bataloj nelaciigebla revenis al sia ĉefurbo en Pasargado.

La finlaboro de Kuroŝo

La sekaoj en la nord-orient-parto de Persujo estis kuraĝintaj tiom, ke ili ade invadis al limoj de Persujo. Kuroŝo en la lastaj jaroj de sia vivo eventoplena por venki kaj puni ilin aliris al nordoriento de Persujo kaj tiu ĉi estis lia lasta atako, kiu eble okazis en 529 a.K., ĉar ĝuste en tiu jaro Kuroŝo forpasis.


Tomirisa, la sokaa reĝino estis dirinta al Kuroŝo, ke estus pli bone por li ellasi sokaan regionon kaj reiri al sia lando, sed Kuroŝo ne estis homo senatenta pri la sekureco, sendependeco kaj totaleco de Persujo. Cetere krom puni sokaojn, li sentis humiliĝon forlasi la arenon de la milito kaj pli grave li devus respondi al impertinenta reĝino sokaa, kiu estis dirinta al li ke ŝi trinkos lian sangon venĝe de sia filo mortinta en ĉi batalo. En ĉi tiu batalo celanta stabiligon de orientaj limoj de Persujo kaj doni finon je ribeloj (intrigo de sokaoj), Kuroŝo malgraŭ la sukceso alprenis vundon. Historiistoj antikvaj jam diris, ke ĵetlanco eniris en lian femuron kaj unu persa soldato vidinte la scenon tuj donis sian ĉevalon al sia komandanto; kvankam la konkeranto sukcesa frue translokiĝis al Pasargado tamen pro vundo post tri tagoj forpasis kaj la militlaboron irana armeo mem kompletigis sola. La grava afero estas tio, ke, li la vivon fordonis por estabiligado de politika situacio kaj aŭtoritato de Persujo.

Konsilo de Kuroŝo

Lia forpaso kiel ajn ĉu en sokaa milit-areno laŭ Herodoto, aŭ sur lito laŭ Gzenofono, li en la lastaj tagoj de sia vivo estis kuŝanta en la lito kaj ordonis al sia edzino Kasandane kaj siaj gefiloj Kebuĝi (Kambuĝije), Bardia kaj Atosa kaj ĉiuj amikoj liaj kunvenu ĉe lin. Servisto demandis lin ĉu li volus bani aŭ tagmanĝi?

Kuroŝo diris, ke li emas ripozi kaj trinkis unu glason da akvo tutplezure kaj poste komencis sian lastan parolon:

"Gefiloj miaj, amikoj miaj! Nun mi estas alproksimiĝanta al la fino de la vivo kaj tion mi jam perceptas per signoj evidentaj. Por helpi aliajn mi pasigis la vivon, ne por la supereneco super ili. Kiam mi mortos, ne kovru mian korpon per oro kaj arĝento kaj



kiom eble plej rapide redonu ĝin al la tero, kio ĉiujn bonajn, purajn verdaĵojn kreskigas en si. Mi ĉiam estis sukcesa reĝo kaj Ormozdo kaj aliaj Dioj ĉiujn bonaĵon donacis al mi. Pro tio mi adoris ilin kaj oferis por ili kaj rekonstruis la preĝejojn de la gentoj kaj al ili mi donis relegian liberecon. Je la nomo de Dio kaj niaj praŭloj forpasintaj *se vi volas puni vian malamikon, bonfaru al viaj amikoj.*

Mi, al vi gefiloj miaj, de infanaĝo instruis, ke ĉiam estu respekte hontemaj antaŭ la maljunuloj kaj mia deziro estas tio, ke tiel vi

kondutu, por ke malpliaĝuloj reciproke estu hontemaj al vi. Gefiloj miaj, mi egale vin amas, sed mia pli aĝa filo Kebuĝi, post mi direktos la landon. Ho Bardia! Vi ĉiam devas obei vian fraton kaj Ho vi Kebuĝi! Ne supozu, ke la reĝa bastono ora gardos vian kronon kaj tronon sed amikoj sinceraj al la reĝo estas pli certaj bastonoj. Se iu el vi ĉiuj volas vidi mian vizaĝon ankoraŭ vivan, alproksimiĝu kaj kiam mi kovros mian vizaĝon, neniun mi volas rigardi al mia vizaĝo. Estu unueca, se vi ne estus tia, malbenita estu vi.

El ĉiuj persoj kaj unuiĝintoj postulu ĉeesti en mia maŭzoleo kaj min gratulu, ke plu de nenia malbono mi suferas." (Kuroŝo-letero)



La maŭzoleo de Kuroŝo en Pasargad proksime al Ŝirazo

Kaj tiel estis, ke reĝo justa post jaroj ne laciigebla pri disvastigo, fortigo, stabiligo de limoj de persa situacio subtervualigis la vizaĝon kaj en manpleno da tero kvietiĝis, sed donacis al homo la tipon de regado libereca, pensojn superaj, modernaj kaj mondskalaj.

La ĉarto de la libereco:

Post la Babela milito (la ĉefvenko de Kuroŝo) vortoj belaj desegniĝis sur steleo argila. La granda konkeranto persa nun jam deklaracion puplikigis kies ĉefa akso estas justeco, libereco, egaleco en voĉdonado, pensoj, opinioj, tradicioj kaj kredoj religiaj, rajto kaj limo de la individuoj en unu kunveno politika, en kiu ĉiuj konceptoj menciitaj estas priskribitaj kaj ĉiu homo devas plenumi ĝin. Ne diferecas la reganoj esti en kia prestiĝo kaj rango socia. La ĉefa afero estas, ke ĉiuj devontigas sin havi estimon reciprokan kaj observi iome da rajtoj antaŭ unu la alia cele al bonvivado kaj konduki la politikan socion al pozicioj superaj kaj elstaraj.

Efektive la grava kaj brilanta parto de la agaro kaj politika konduto de Kuroŝo estas lia ĉarto:

"Nun, kiam per helpo de Mazdao la reĝan kronon de Persujo, Babelo kaj landoj ĉirkaŭaj mi jam surmetis, mi proklamas, ke ĝis kiam mi estus vivanta kaj Mazdao la reĝecon favoros min, mi estimos la relegiojn kaj ritojn de nacioj kies reĝo mi estas, nek mi permesos al regantoj kaj miaj subuloj subtaksi ilin. Al neniu nacio, gento kaj lando mi altrudos mian regadon kaj ĉiu nacio estas libera nomi min sia reĝo kaj por regi super ili mi ne ekmilitos.

Ĝis kiam mi estus vivanta kaj Mazdao favorus al mi la reĝecon, al neniu mi permesos maljuste trakti alian. Se iu estus subpremata, mi forprenos lian rajton el la premanto kaj redonos ĝin al subpremito kaj punos la preminton.

Mi ne permesos ke movebla aŭ nemovebla posedaĵo de iu persono estu kaptita senpage kaj perforte aŭ alimaniere malgraŭ la volo de la posedanto.

Mi ne permesos onin servutigi kaj laborigi iun senpage.

Mi hodiaŭ anoncas ke ĉiu estas libera adori sian deziratan religion kaj vivi en ĉiu loko kaj lando, kiu plaĉas al ili.

Mi anoncas, ke ĉiu estas respondeca pri siaj agoj. Neniu devus esti punita pro peko de alia aŭ de siaj parencoj. Se unu el la familianoj faros pekon, nur li devus esti punita, ne aliaj.

Mi ne permesos, ke la viroj la virinojn vendu kiel servutulojn kaj sklavinojn kaj la regantoj kaj suverenoj miaj ankaŭ devas malhelpi tion.

De Ahura Mazdao mi petas fari min sukcesa en agoj miaj." ★

Fonto:
Ŝargh(Oriento)tagĵurnalo, Tehrano, n-ro:244, 19an de Julio 2004.

F-ino M. Fahmi tradukis

Enkonduke pri Irano

Hamzeh Ŝafii

La naskiĝoloko de unu el la mondaj grandaj imperioj, Irano, estas la lulilo de kulturo kaj civilizacio. Irano estas lando benata kun abundo da naturaj belecoj, dotitaj per riĉaj rimedoj; vasta lando vualita en mistero, mistiko, enamiĝo kaj religio.

Irano, kiel unu el la plej superaj civilizacioj en la mondo dum antikvaj tempoj, inspiris multajn grandajn vojaĝantojn de la okcidento. Kun imperia historio de pli ol 2500 jaroj, Irano estas rigardita kiel mistero al la cetera mondo dum longaj jarcentoj. Por multaj estas ankoraŭ viv-tempa revo viziti Iranon kaj paŝi en la lando kun unika historio kaj kulturo.

Irano estas nekredeble rekompencanta celloko: ĝi havas antikvajn ruinojn belajn, la ĉarmo de la interesega Persepolo kaj grandaj palacoj de la pasinteco rivelas sensuspektan belecon kiu ĝuigas turistojn por vivdaŭro kaj rememorigas al ili la allogon kaj buntecon de lando, kiu estas en la proceso de moderniĝo kune kun grandaj moskeoj, ravegaj ĝardenoj kaj tiel belaj dezertoj kaj montaraj pejzaĝoj.

Irano estas lando de akra kontrasto, alterne montara kaj dezerta: super-grandaj terpecoj tute senhoma kaj sterila, kaj aliloke kaj nemalproksime intense fekunda. De ĝiaj densaj, verdaj arbaroj kaj neĝ-kovritaj mont-pintoj de la nordaj partoj, ĝis ĝiaj vastaj, varmaj, sablaj dezertoj de la sudo kie oni trovas ĝemeskajn miraĝojn en la brula varmo, ĉio kaj ĉio, estigas belan pentraĵon kun ravega rafinaĵo.

Irana geografia pozicio faris ĝin la ponto por komunikado tera inter For-Orienta Azio kaj la landoj de la Mediteraneo kaj Eŭropo. Eĉ historie ĝi estis rol-ludanta kiel luman ligon inter antikva kaj moderna civilizacio.

La pratempa pasinteco de Irano estas multe pli malnova ol la plej frua Irana dinastio, t.e. la Aĥemenidoj (550-330 a.K.). Ekzistas pruvaĵoj por homa loĝado en Irano antaŭlonge de la naŭa jarmilo a.K. Dum la tria kaj dua jarmiloj a.K., okcidenta Irano estis regata per la elamaj dinastioj (2850-705 a.K.) pere de la grandaj ĉefurboj de Ŝuŝo (Suzo) kaj Anŝano.

Estis Kuroŝo (Siruso aŭ Cyrus) la granda (r. 550-529 a. K.) la fondinto de la Aĥemenida reĝa dinastio kiu alportis la tutan Iranon sub ununuran regadon por la unua fojo. Tiel li fariĝis la ŝaho de la ŝahoj (en la persa ŝahanŝah, t.e. ŝah-ŝaho) de la vasta imperio persa. Sekvantaj la Aĥemenidojn, la Partoj kaj Sasanidoj regis la Iranan altebenaĵon ĝis la konkeriĝo per araboj alportanta Islamon en la sepa jarcento p.K..



Persepolo - Ŝiraz

Ondoj da invadantoj tra la longa historio de la tuta lando - la grekoj akompanantaj Aleksandron, arabaj armeoj, turkaj triboj, kiuj trabatalis sian vojon okcident-direkte de la Centra Azio, kaj fine la Mongoloj, ĉiuj postlasis sian impreson ĉe la popolo de Persujo.

Irana historio restis videbla en la multaj ekscitaj arkeologiaj regionoj de la lando, ĝiaj antikvaj kaj historiaj monumentoj, kaj ĝiaj gloraj urboj, kiuj posedas parton de la plej imponaj ekzemploj de irana kaj islama arto kaj arkitekturo de la mondo.

Diversaj kulturoj kaj popoloj estas trovataj irane, kaj estas konsiderinda kontrasto inter la

kutimoj kaj vivmanieroj de la diversaj regionoj.

Kun longa kaj varia historio, Irano havas riĉan kulturan heredaĵon. Estas abundo de historia, arkeologia kaj sanktaj lokoj de ega intereso.


La vario en artismaj allogaĵoj kaj diversaj manfaritaĵoj estas vastega. Krom ĝia fama tapiŝo, miniaturo, kaligrafio kaj metalaj manfaritaĵoj estas pli larĝa gamo de metiaj produktoj. Estas multaj muzikaj formoj de granda fajno, dum Irano povas fieri por posedi plurajn de ĉefaj verkistoj kaj poetoj de la universala historio.

Estas pli ol 20 urboj de grava turisma intereso. La ĉefaj, krom Tehrano mem, povus esti enlistigita kiel Esfahano, Ŝirazo, Maŝhado, Jazdo, Kermano, Hamadano, Bandar-Abbaso, Kermanŝaho, Tabrizo kaj Urumijjeo.

Estas ankaŭ tre diversaj distraĵoj kaj sportoj kiel skiado en la nordo de la ĉefurbo ĝis velado kaj akvo-skiado en la duon-tropikaj maroj de la suda marbordo.

Irano estas tre bunta lando el ĉiuj vidpunktoj, precipe topografie kaj klimate. Ĝi estas granda lando kun vasteco de pli ol 1,648,000 kvadrataj km en Sudokcidenta Azio, preskaŭ tri fojojn pli vasta ol Francio, pli granda ol la kompleto de Belgio, Francio, Nederlando, Germanio, Svislando kaj Britio.

Laŭ UNESKO, Irano estas inter la mondaj 10 plej historiaj kaj kulturaj allogaĵoj de la mondo. Tamen irana porcio de la internacia turisma merkato ne akordas kun ĉi tiu prestiĝa rango. Turismo en Irano nun estas en ĝiaj fruaj jaroj. Ne estas pli ol ses aŭ sep jaroj ke la lando ekfaris ampleksan planon por akceli ĝian turisman industrion. Antaŭ tiam, Irano estis okupata pri senbrida milito, kiu preskaŭ



Nagŝe Ĝahan placo—Esfahan

faris vanaj ĉiujn provojn allogi turistojn. Sed post la ĉesigo de militado Irano eniris eraon de rekonstruo en ĉiuj flankoj, kaj stadie turismo eniris la ekfloradon.

Estas pliiĝanta kreskado de la nombro da turistoj, kiuj vizitas Iranon en la lastaj jaroj; tendenco kiu ekĝuis gravan turniĝon post la monde bonvenigita iniciato de Irano "dialogo inter civilizacioj" portretanta novan bildon de Irano antaŭ la okulojn de la mondo. Ĉiam pli da homoj aktuale vojaĝas Iranon, la malnovan, misteran Persujon.

Persujo, Irana eksa nomo ĝis 1935 devenas de la historia eminenteco de la provinco nomata Fars aŭ Pars, je tempo kiam la Grekoj kiuj eknomis ĝin Persis provis konkeri la landon.

La nuna loĝantaro de Irano estas ĉirkaŭ 70 milionoj; 70% de ili loĝas en urboj.

La loĝantaro havas junan aspekton kun 40% sub 14 jar-aĝo. Irano estas lando de granda religia signifo. Irano estas Islama Respubliko kaj la oficiala religio estas Islamo. 98 procentoj de la loĝantaro estas islamanaj, plejparte Ŝijaistoj. ★



La pomo

Hamid Mosaddeg

Vi eke al mi ridis
Kaj neniel sciis
Kun kia timo
El ĝardeno de l' najbar'
Mi forŝtelis la pomon
La ĝardenisto ekkuris
Sekvante min tre rapide
Li vidis pomon en via mano,
Kaj kolerege rigardis al mi
Ekfalis teren la mordita pom'
De via mano
Kaj vi iris, kaj ankoraŭ
Post pasado de multjaroj
Susurado de viaj paŝoj
Reade kaj etete
Min ĝenadas ĉe l' oreloj

Kaj meditante mi dronintas en la penso:
"Vere kial malhavis pomon
La ĝardeneto de nia domo?"

Tradukis: (s-ro) Saed Abbasi



سیب

حمید مصدق



تو به من خندیدی
و نمی‌دانستی
من به چه دلهره
از باغچه‌ی همسایه
سیب را دزدیدم

باغبان از پی من تند دوید
سیب را دست تو دید
غضب‌آلود به من کرد نگاه
سیب دندان زده از دست تو افتاد به خاک
و تو رفتی و هنوز،
سالها هست که درگوش من آرام،
آرام
خش خش گام تو تکرارکنان
می‌دهد آزارم

و من اندیشه‌کنان غرق این پندارم،
- که چرا،
- خانه‌ی کوچک ما
سیب نداشت.

Profeto aŭ forĝisto!

Iu iris ĉe reĝon kaj pretendis ke: "*Mi estas Dia profeto kaj vi devas kredi min*". La reĝo diris "Kio estas via miraklo?" Li respondis:*"Ĉion kion vi volas mi povas tuj fari"*. La reĝo metis seruron antaŭ li, kaj diris, do, se via pretendo veras, malfermu la seruron senuze de iu ajn ŝlosilo. La viro kolerante kriis: *"Mi estas profeto ne forĝisto"*.

Ses monata homo kaj preĝo!

Tage iu kristano islamaniĝis. Oni diris al li: *"Nun vi estas Kiel infano kiu ĵus naskiĝis el sia patrino"*. Post forpaso de ses monatoj ne farante religiajn taskojn kiel preĝon, oni asertis kaj alvenigis lin ĉe la juĝisto. La juĝiston diris: "*Kial vi neglektas la taskojn?"* Respondis la viro: *"Kiam mi islamaniĝis oni diris al mi* ***"Ĵus vi naskiĝis".*** *De tiam ĝis nun, pasas nur ses monatoj, do nun vi mem juĝu, de ses monata infano kiu atendas preĝon?"*

Tradukis: N. E. Lumina

Floroj el "La Florejo" de Sadio

Kaj daŭre burĝonas floroj en tiu ĉi ĝardeno de la revuo. Estas elektitaj kvin rakontoj el la fama libro de Sadio por vi, esperante vian plezuron.

Kiam pro malsaĝo de junaĝo mi ekkriis al mia patrino, ŝi ĉagrenite eksidis en angulon kaj plorante diris: "Ĉu vian malfortecon vi forgesis ke tiel forte vi min agresis?"

Rigardante sian ribeleman filon
kiom ĝuste oldulino riproĉis lin:
"Se vi rememorus vian infanecon
kiam vi estis malforta en mia sin',
tion vi ne farus al via patrino
kiam vi estas vir' kaj mi maljunulin'.

وقتی به جهل جوانی بانگ بر مادر زدم دل آزرده به کنجی نشست و گریان همی گفت مگر خردی فراموش کردی که درشتی می کنی.

چه خوش گفت زالی به فرزند خویش چو   دیدش پلنگ افکن و پیلتن
گر از عهد خردیت یاد آمدی   که بیچاره بودی در آغوش من
نکردی در این روز بر من جفا   که تو شیرمردی و من پیرزن

* * *

Estas dirite ke al sciulo apartenis filino havanta ekstreme malbelan vizaĝon kaj atinginta virinan maturaĝon. Kvankam ŝi posedis riĉon kaj havaĵaron, neniu emis fari kun ŝi paron.

Malbela ŝajnas silkaĵo ĉina
sur la korpo malbel-fianĉina

Fine pro neceso ŝi fariĝis edzino de blindulo. Estas dirite ke tiam venis kuracisto el Serendibo[1] kiu donis vidpovon al blinduloj. Oni diris al la sciulo:"Kial vi ne kuracigas vian bofilon?" Li respondis: "Mi timas de tio ke neblindiĝinte li forlasos mian filinon."

Al malbelulin', edzo blinda estas pli inda.

آورده‌اند که فقیهی دختری داشت به غایت زشت بجای زنان رسیده و با وجود جهاز و نعمت کسی در مناکحت او رغبت نمی‌نمود.

زشت باشد دبیقی و دیبا   که بود بر عروس نازیبا

فی‌الجمله بحکم ضرورت عقد نکاهش با ضریری بستند آورده‌اند که حکیمی در آن تاریخ از سرندیب آمده بود که دیده نابینا روشن همی کرد فقیه را گفتند داماد را چرا علاج نکنی گفت ترسم که بینا شود و دخترم را طلاق دهد. شوی زن زشت روی نابینا به.

* * *

Mi vidis sur marbordo piulon suferantan de nekuracebla panter-vundo. Daŭre li turmentis sed ĉiam dankis Dion, la plej valoran kaj la plej gloran. Oni lin demandis: "Kial vi dankas?" Li respondis: "Tial ke mi suferas de korpa lezo kaj ne de peko-pezo."

Se tiu kara amik' mortigos min
ne pensu ke pro l' morto mi hororos,
sed mi diros: " Pro kiu peko mia
li ĉagreniĝis?"; tial mi angoros.

پارسایی را دیدم بر کنار دریا که زخم پلنگ داشت و به هیچ دارو به نمی‌شد. مدتها در آن رنجور بود و شکر خدای عز و جل علی الدوام گفتی. پرسیدندش که شکر چه می‌گویی گفت شکر آن که به مصیبتی گرفتارم نه به معصیتی.

گر مرا زار به کشتن دهد آن یار عزیز   تا نگویی که در آن دم غم جانم باشد
گویم از بنده مسکین چه گنه صادر شد   کو دل آزرده شد از من غم آنم باشد

* * *

Iu informis Anuŝiravan-on[2] la justan kaj diris: "Ĉu vi aŭdis ke laŭ volo de Dio, la plej valora kaj la plej glora, unu el viaj malamikoj jam ne vivas?" Li respondis: "Ĉu vi aŭdis tion ke de tia sorto Li min ekskluzivas?"

Ne ĝoju se malamiko estas morta,
ĉar nia vivo ankaŭ estas samsorta.

کسی مژده پیش انوشیروان عادل آورد گفت شنیدم که فلان دشمن ترا خدای عز و جل برداشت گفت هیچ شنیدی که مرا بگذاشت.

اگر بمرد عدو جای شادمانی نیست   که زندگانی ما نیز جاودانی نیست

* * *

Abu-Harire(3), aprobo de Alaho estu al li, ĉiutage venis ĉe la islaman profeton, la beno de Alaho estu al li. Li diris: "Ho Abu-Harire, ĉiu-du-tage venu unu fojon por pliigi mian ĝojon."

Al saĝulo oni diris: "Malgraŭ tiom da utilo kiom ekzistas en sunbrilo, neniun oni aŭdis kiu ĝin laŭdis." Li respondis: "Ĉar ĉiutage ĝi estas videbla krom dum vintro kiam por ĝi ekzistas kurteno kaj inklino."

Vizito indas sed nur tiom
ke oni ne diru: "Sufiĉas!"
Vi ne aŭdos ies riproĉon
se daŭre vi mem vin riproĉas.

ابوهریره رضی‌الله عنه هرروز به خدمت مصطفی صلی‌الله علیه آمدی گفت یا اباهریره ز رنی غبا تزدد حبا هر روز میا تا محبت زیادت شود.

صاحبدلی را گفتند بدین خوبی که آفتاب است نشنیده‌ایم که کس او را دوست گرفته است و عشق آورده گفت برای آنکه هر روز می‌توان دید مگر در زمستان که محجوب است و محبوب.

بدیدار مردم شدن عیب نیست   ولیکن نه چندانکه گویند بس
اگر خویشتن را ملامت کنی   ملامت نباید شنیدنت از کس

•

1- Antikva nomo de Cejlono.
2- Irana reĝo de Sasanida dinastio, fama pro justeco.
3- Unu el kunuloj de Mohamedo (la beno de Alaho estu al li).

Rara Mirindaĵo!

Alisadr- Kaverno

Simin Emrani

En la okcidento de Irano, 336$_{km}$ for de Tehrano lokas Hamedan-urbo. La fama greka historiisto "Herodoto" citas pri tiu urbo nome "Hegmatane" aŭ "Ekbatan". Ĝi estas el la plej malnovaj antikvaj urboj en la mondo kaj aĝas pli ol 3000 jarojn.

En la vilaĝo Alisadr el provinco Kabudar-Ahang, 75 km-ojn nord-okcidente de Hamedano, sur deklivaĵo de Su-baŝi monto situas unu el naturaj mirindaĵoj de la terglobo kaj malofta tipo inter boatrajdeblaj akvokavernoj.

La situo de kaverno Longitudo: 48° 18`, latitudo: 35° 18` kaj ĝi 1900$_{m}$ altas de sur marnivelo. Geologoj taks-divenas la antikvecon de la ŝtonoj je la dua erao (antaŭ 136 – 190 milionjaroj). Tiu-ĉi kaverno eltroviĝis en 1967. De 1975 turismi en ĝi jam komenciĝis kaj de 1991 multaj turismaj organizoj kaj firmaoj plifortigis siajn serv-aktivadojn ĉi-rilate.

Alisadr post iu kaverno en Usono kaj la alia en Indonezio estas la plej vasta en la mondo. Tiu de Usono ne havas akvon. Promenadi en Alisadr-kaverno plezuriĝas per pedal-boatoj. Diverskaŭze kaj pro la akvopasejoj kiuj ligiĝas unu al la alia kaj



pro ankaŭ multaj lagoj tra la kaverno, oni povas viziti unu el plej belaj tipoj de naturo en Irano.

La akvo de lagoj estas senkolora kaj senodora kies gusto ankaŭ estas normala. Neniu vivantaĵo ekzistas. Akvo estas fikse malvarma dum jaro preskaŭ 12° centigrado kaj estas tiel pura kiel videblas



perokule 10 metrojn funde. La fundo en diversaj partoj (0-14 m) varias. La akvo estas ricevata el subteraj fontoj kaj atmosfera neĝo-pluvo kiel konstanta akvofalo de sur muroj.

La aero. Pejzaĝo ene de la kaverno estas speciala. La aero tre pura kaj freŝa sen ia polvo aŭ malpuraĵo mikroba. En la somero malvarmas kaj en la vintro agrable varmas. Se vi havus brulantan kandelon, ĝia flamo neniam moviĝos.

Multaj elementoj ekzistas en la ŝtonoj kiel kupro, fero, magnezio kaj tre belaj koloroj kiel ruĝa, bruna, blua kaj verda okulkaresas.

Laŭdire dum diversaj militaj atakoj speciale atako de Ĝingiso-Ĥano tiu ĉi kaverno estis imuna rifuĝejo de batalantoj kaj militistoj, ili eĉ dum 4 monatoj per tre malmultaj manĝetoj povis nutri kaj kaŝi

Amazon en Ameriko aŭ en Irano?!

Irana historiisto malkaŝas sian eltrovon pri malnova historio. Laŭ li Amazonanoj devenas de Irano. Jen parto de lia longa intervjuo kiu rilatas ekzakte pri Amazonanoj.


D-ro Ĝahangir Mazhari
Historiisto

La nomo de Amazon kiu nin rememorigas pri Amazon-rivero en la suda Ameriko, estis nomo de tribo kiu iam vivis en la nordo de Irano. Ĉi tiu militema kaj atakema tribo havis sian specialan tradicion kaj socian sistemon. Ili estis militintaj ankaŭ kontraŭ Darjuŝo kaj Kuroŝo Haĥamaneŝa (Aĥemenidaj). Estis interesaj virinoj en la tribo kiuj havis malkaŝe superregadon sur grupa vivmaniero kaj pli penema ol viroj. Herodoto* ankaŭ priskribis ilin.

En milito inter grekoj kaj Amazonoj, grekoj post venko en Termudo enŝipiĝis kaj portis milit-kaptititojn de la tribo. Ĵus atinginte al la mezo de maro, la virinoj atakis al viroj kaj mortigis ilin. Sed ili ĝis tiam ne estis vidintaj ŝipon. Do ili ne povis irigi la ŝipon. Finfine ili atingis al Kremen-bordo. Tie ili forlasis la ŝipon kaj serĉis sekuran loĝejon. Ili estis spertaj ĉevalrajdantoj kaj kiam renkontis ĉevalaron, unu post la alia surĉevaliĝis.

Sitoj aŭ Sokaoj** loĝis en nordo de Irano, sed ili sciis nek lingvojn nek tradiciojn kaj rason de la amazonoj. Poste ili ekis por militi kontraŭ amazonoj. Sed je la fino de la milito rigardante amazonajn kadavrojn ili komprenis ke militantoj ĉiuj estis virinoj! Do ili ne daŭrigis militon kaj revenigis trankvilon al la regiono. Iom post iom en la geografia najbareco restis virinoj de la milito, kiuj nur volis trankvilan lokon por vivi kaj akiri sekurecon. Tio kaŭzis ne plu mortigi kaj militi. Ĉi tiuj virinoj ĉiam kiel siaj praavoj ĉesadis, ĉevalrajdadis kaj kun siaj viroj militis ŝulturo ĉe ŝulturo kaj sin vestigis kiel viroj.

La nomo de Amazon kiu nin rememorigas pri Amazon-rivero en la suda Ameriko, estis nomo de tribo kiu iam vivis en la nordo de Irano

Iu tradicio ekzistis inter amazonoj ke se iu fraŭlino nemortigos unu el siaj malamikoj, ne rajtas edziniĝi. Ankaŭ ekzistis fraŭlinoj kiuj ne povis plenumi tiun kondiĉon kaj neniam edziniĝis.

Sitoj aŭ Sokaoj en siaj lingvoj nomis amazonojn «juropat», tio signifas «rompi viron» tribo Sarmat aŭ Suromat kiuj poste ekloĝis en nordo de Eŭropo ekzistas per mikso de soka raso kaj Amazon raso.

Tradukis: Fariba N. Maĝd

Fonto :
Ŝargh tagĵurnalo, N-o: 294, 20 Sep 2004 P. 19

* Titolita patro de historio, li vivis 484-425 a.K. Li estas de Hálikárnáss, greka kolonio de centra Azio, tiam tiu urbo estis parto de Irano. Kelkfoje ŝajnas ke li rakontas fantazie anstataŭ rakonti historion.

** La nomo de antikva kaj miksita tribo, pli multaj de ili estas arjaj, ĉi tiu tribo vivis dum la aĥemenidaj periodoj kaj eĉ antaŭ ili.

sin en ĉi vasta loko.

Entute vizitado de la belformaj stalaktitoj kiuj similas al objekto, besto, vegeto, frukto kaj la giganta stalakmito, la 3-a kaj 4-a insuloj, boatado, kaverntursimi, preterpasi la serpentumantajn akvokanalojn, naturaj koridoroj kiuj havas kristalajn plafonojn, ĉiuj ĉi montras al vizitantoj kredeble jen raran mirindaĵon.

Fontoj:
www.swisr.org
www.hamedanfair.com
www.itto.org
www.iranview.com
www.bamjam.net
www.darmangaran.com
www.mohajeri.com

NE EKZISTA VOJO AL AMO
AMO ESTAS VOJO

La suno estas por multaj la plej kutima aĵo en la mondo.
Tamen, ĝi ĉiutage produktas miraklon.Ĝi lumigas kaj varmigas la mondon por mi. Ĝi baraktas kun nuboj por vidi min. Kaj por donaci belan tagon al mi. Nokte ĝi migras al la alia flanko de la mondo. Por tie donaci lumon al la homoj.

Simile okazas kun amo. Kiam amo estas en mia vivo. Ĝi alportas lumon kaj varmon.

Kiam mi havas amon, Mi povas malhavi multon.
Sed kiam amo malaperas en mia vivo. La ombroj fariĝas pli grandaj. Kaj inundas min malvarmo kaj nokto.

Amo estas kiel la suno. Kiu havas ĝin povas malhavi multon. Kiu malhavas amon, malhavas ĉion!

Ivo Durwael

راهی به سوی عشق نیست
عشق (خود)راه است.

برای خیلی‌ها خورشید معمولی‌ترین چیز جهان است. با این همه، هرروز معجزه‌ای را خلق می‌کند. جهان را برای من گرم و روشن می‌کند. برای دیدن من با ابرها در می‌افتد. و برای هدیه دادن روز زیبا به من در شب به دیگر سوی جهان هجرت می‌کند. تا که آن‌جا نور را به انسان‌ها هدیه کند.

عشق هم چنین است. هنگامی که عشق در زندگی من است. نور و گرما می‌آورد.
هنگامی که عشق دارم. می‌توانم خیلی چیزها را نداشته باشم! اما وقتی عشق از زندگیم رخت برمی‌بندد، سایه‌ها سنگین‌تر می‌شوند و سیل و سرما و شب، در برم می‌گیرد.

عشق مانند خورشید است. هرکه آن‌را دارد می‌تواند خیلی چیزها را نداشته باشد.
هرکه عشق را کم دارد، هیچ ندارد!

ترجمه: اعظم الیاسی- تهران

Vivtagoj ...

Mi grimpas supren al la temp-monto.
Nun mi estas sur supro de la temp-monto.
Nun mi proksimas al la ĉielo.
La suno varmigas min.
Mi kalkuladas tempon: sabato, dimanĉo, lundo ... .*
Mi vidas viv-domojn, dometon kaj domegon kaj domaĉoj staras post unu la aliaj kiuj sensigas feliĉon kaj kiuj sensigas malfeliĉon.
Mi kalkuladas tempon:
mardo, ĵaŭdo, vendredo... .

Mehrzad Hosejni

*Ndlr.: La semajno en Irano komenciĝas je la sabato.

Miaj instrulaboro kaj impresoj en Irano (3-a kaj lasta parto)

Tereza Kapista / Serbio

Tamen la trafiko simple dirite estas terura kaj danĝera. Neniu trairas la straton sur la zebro-striado kaj neniu rigardas la trafiklumigilon, nek la stiristoj nek la piedirantoj. Trairi al alia flanko de la strato estas danĝera aventuro. Mi vere timis trairi kvankam en mia urbo ankaŭ estas du miliono da loĝantoj, tamen ni scias kion signifas la ruĝa lumo. Sed mirinda afero ĉar dum tuta mia restado mi ne vidis trafikiakcidenton! Sed la nesufiĉe rafinigita benzino polucias la aeron. Kiel nebulo la aero estas densa super la urbo. Oni diras ke Tehrano estas unu el la plej aerpoluciitaj urboj en la mondo. Ĝis la loĝejo ni bezonas unu horon per taksio! Kaj mi kelkfoje vojaĝis sola.

La 14an de decembro venis kvar afganinoj Dijana, Akbari, Salehi kaj Saĝĝedi kun Vahid Partovinia. Nia denova renkontiĝo estis elkora parencsimila. Ili morgaŭ ĉeestos Zamenhofan tagon. Mi ĝojis denove vidi ilin. Du el ili dormis ankaŭ ĉe Nazi kaj ni denove longe babiladis ĉiuj kune.

La duan vesperon mi iris kun s-ro Ahmad Mamduhi kaj lia filino al speciala manĝejo. Ni sidis sur tapiŝo kaj manĝis –sukon kaj viandon-, tio estis la nomo de manĝaĵo. Unue ni devis la fluidan parton manĝi kun la pano enpecigitan en ĝi kaj poste batadi la reston en la ujo kaj manĝi kiel kaĉon. Ĉie oni servas nur forkon kaj kuleron. Oni dum manĝado tranĉilon ne uzas. La forko estas en maldekstra mano kaj per ĝi vi fiksas la tranĉendan manĝaĵon kaj per kulero en dekstra mano tiras-tranĉas. La forkon ne metas en la buŝon, nur la kuleron! La irananoj diras: donu akvon mi deziras manĝi ĝin! (ne trinki !) Ŝatata estas la jogurto gasigita kaj maldensigita per akvo, kaj iom acideta kiel trinkaĵo.La pano estas tio kion mi plej ŝatis en Irano. Ĝi estas ege maldika ĉ-1-2 cm kaj estas bakita en fornoj en kiu estas rondaj ŝtonetoj kaj la panoj bakiĝas sur ŝtonetoj kaj tiujn oni nomas ŝtonaj panoj grandaj duonon da kvadratmetro.

La 15an de decembro kun Nazi ni iris al arta galerio kie oni daŭre instruas la malnovajn artajn teknikojn kiel: ĥatam-inkrustado, teksado, intarzio en ligno, potfarado kun specialaj iranaj ornamaĵoj, prilaborado de artaj objektoj el kupro kaj aliaj metaloj, teksado de silko, kaligrafio en vere diversaj formoj kaj materialoj. Tre plaĉis al mi ĉar oni povas vidi la procedon de la ellaborado kaj la uzitan teknikon. Nature la belegaj artaĵoj estas ankaŭ ekspoziciitaj. Ni eniris ankaŭ la oficejon kie oni regalis nin per kukoj kaj teo kaj ni parolis pri la stato de artistoj en tempo kiam la homoj ne havas laboron kaj monon por vivteni sin, eĉ ne pensante pri la aĉetado de artaĵoj. Sed ili eksportas multon ĉar tiuj art-objektoj estas konataj en la tuta mondo.

Post la kursoj okazis la Zamenhofa Vespero. Mi havis eblecon konatiĝi kun s-ro Aref Azari honora memebro de UEA el Irano. Li dankis pro mia alveno kaj farita laboro. Al centro venis multaj E-istoj por festi Zamenhof-vesperan programon kiun malfermis Reza Torabi. La unua preleganto estis Ahmad Mamduhi kiu prelegis pri eblecoj kaj aperoj de multaj E-o programoj en komputila medio en la mondo, tre utila prelego. Poste mi parolis pri Esperanta libro kiel ekaperis kaj atingis ĝis nun pli ol 40.000 titolojn. Post mallonga paŭzo la ĉeestantoj povis vidi la libro-ekspozicion eĉ aĉeti librojn. Poste parolis Hadise Akbari pri agado de Afganaj virinoj kaj ilia klubo kaj ankaŭ pri la kursoj kiuj pasis antaŭ kelkaj tagoj en Maŝhad. Ilia aktivado estas vere laŭdinda!(Mi aŭdis ke unu el ili iros al Ĉinio al UK je la kosto de Centro). Poste mi ludis la teatraĵeton pri Parolema edzino, kiun verkis mia amikino

Greta Stol 92 jara Esperantistino kaj poetino, kiu vivas en Beogrado. La silenteman edzon rolis Reza Torabi. Mi donis la Antologion de la serba poezio, kiun kompilis kaj pli ol 120 poemojn tradukis Greta Stol kaj kiu sendis ĝin al Centro donace. Poste okazis regalo per kukoj kaj teo kaj ni interparoladis dum longa tempo. Tio estis bonega okazo al mi konatiĝi kun multaj E-istoj en Tehrano .Mi konstatis ke vere ekzistas la movado kaj malgraŭ la malbonaj cirkonstancoj ili tamen aktivas. (Grandaj distancoj de la Centro, tempomanko pro la laboro ĝis vespero k.t.p.)



En la pra-irana muzeo

La sekvan matenon kun sekretariino de Centro kaj kun Vahid ni vizitis Muzeon pri moderna arto. Belega konstruaĵo kaj la plej interesa por mi estis granda baseno en la centro kaj la balkonoj kiuj ĉirkaŭas ĝin. Japana arkitekto donis tiun ideon. En la muzeo ni konatiĝis kun ĵurnalistino kaj violonisto, ege ĉarmaj gejunuloj, kiuj aŭdante nian interparolon en E-to interesiĝis pri tiu lingvo. La junulo donacis al mi kaligrafiaĵon kiun li faris tuj, samloke en muzeo, ĉar ankaŭ pri tio spertas. Tio estis ilia unua kontakto kun E-to kaj plaĉis al ili la ideo de E-to kaj ĉar la junulo konas la hispanan li multon komprenis ĝuante tion.

Posttagmeze okazis la du kursoj. Mi tranoktis dum 2 tagoj ĉe s-ino Arezu kiu havas la filineton Hana. Vespere ni rigardis DVD. Tre populara estas la greka komponisto Yanni kaj la koncerto okazis ĉe Taĝmahalo kaj en Malpermesita urbo en Ĉinio. Sed koncerti en Tehrano li ne ricevis permesilon. Dum vespero Hana dancis senĉese kaj entuziasme. Mi opinias ke la dancado estas en ilia geno, kaj neniu povas malpermesi danci al iraninoj. Se mi loĝus en hotelo mi ne povus vidi la veran vivon de irananoj. La venonta tago estis vendredo kiam laboras nur kelkaj vendejoj kaj ni vizitis iun etan vendo-centron kun Arezu, ŝia bofratino kaj la infanoj. Ankaŭ interesa por mi. Ekzistas tute apartaj vendejoj nur kun kaptukoj por virinoj ĉar ĉiuj devas havi ĝin ekde la 7-a jaraĝo. (Imagu se duono da iranoj estas virinoj tio estas 40 miliono!). Ekzistas diversaj kaptukoj eĉ multkoloraj kaj la junulinoj jam portadas tiajn! Stranga por ni, sed kiam mi pli bone pripensis mi konstatis ke ankaŭ en mia lando en Montenegro la virinoj iras kun nigraj kaptukoj sed nur la maljunaj kaj ili tion faras laŭ kutimo kaj ne devige. La junaj ne portas kaptukojn. Same estas en Italio, Hispanio kaj multaj aliaj landoj en vilaĝoj. Irante tra la stratoj mi vidis multajn virinoj kun maskoj medicinaj. Ili operaciigis la nazojn, ĉar se vi povas montri nur la okulojn kaj la nazon tiam ĝi devas esti belega. (Tio estas nun granda modo: malgrandigi la nazon!).

En postagmezaj kursoj venas ankaŭ la du knabinoj Hana kaj Bahar ĉ.4-5 jaraj. Mi uzis iliajn ludilojn dum kurso kaj foje venis kaj prenis iun ludilon dirante “ĝi estas mia”. La patrinoj devis venadi kun ili ĉar la distanco de la hejmo estas ega kaj ili ne povas tiom longe lasi la infanojn ĉe aliaj homoj. Ambaŭ infanoj ellernis E-kantojn kaj multajn vortojn. Mi ĝojis pro tio, ili tute ne ĝenis min.

Kun la paroliga grupo ni faris parolekzercadon kaj la temo estis “Kio estas la vera problemo de la mondo?” Mi klarigis ke mi deziras ilian opinion pri tio, kio estas komuna al ĉiu lando kaj al ĉiu popolo. La respondoj kaj la klarigoj, kial ili opinias ke tio estas la problemo montris ke vere esperantistoj pensas monde ne loke, ĉar la cititaj problemoj estis: senlaboreco, aidoso (komence tio estis kaŝita ke jam aperis ankaŭ en Irano) malsato, polucio, ekologio kaj aparte kelkaj virinoj petis ke ni enlistigu la problemon de la homaj rajtoj, kaj la rajtojn de virinoj. Emerita profesorino diris ke la plej granda problemo estas Usono, pravigante sin ke ili ĉiam ie elvokas militon kaj post tio la nekulpa popolo suferas. Dum du horoj ni diskutis pri tiu temo kaj mi konstatis ke ili tute bone esprimas siajn opiniojn. Se estis iu granda eraro mi notis en la angulo de la tabulo kaj poste mi klarigis kial tiu vorto aŭ

gramatika formo ne konvenis, mi ne rompis ilian paroladon. Mi havis impreson ke ili malpezigis siajn korojn pere de tiuj plendoj pri problemoj.

Posttagmeze okazis la kursoj kaj mi hastas fini ĉiun lernitaĵon antaŭ la fino de la kurso. Mi estas kontenta kun ilia scio. Mi strikte laŭ Cseh metodo instruis la vorton "hundo" kaj havis ludilon, sed poste mi eksciis ke la hundoj estas malpermesitaj bestoj en Irano, kaj tute ne ekzistas, eĉ katon neniu rajtas havi en la domo, ili vivas nur sur stratoj aŭ en parkoj. Mi ne scias ĉu vere tio estas tiel?

La venonta tago ankaŭ estis festotago honore al iu Imamo kiu mortis antaŭ 1200 jaroj kaj nun oni devas funebri lin. La bazaro tamen laboris kaj tie ĉiam estas homtumulto kiu observis nin aŭdante ke ni parolas en E-to.Tamen nia kurso okazis kaj ĉiuj venis ĉar tiam ne laboris kaj la lernantoj ne iris al la lernejoj.

Mi iris dormi ĉe f-ino M. Fahmi kiu vivas kun la fratino. Ili havas belan apartamenton en nova konstruaĵo tre komforta kun propra aŭtejo en la kelo kaj deĵoranton ĉe bele ekipita enireja halo. Vere la sekureco estas plena, ĝuste pro tio ili elektis tiun loĝejon. La domegon ĉirkaŭas bone ordigita kaj flegata parko. Kiam ni promenis ĉie la ĝardenistoj plantis novajn plantojn. Tio en centro ne povas ekzisti. Tamen Tehrano havas kelkajn belajn parkojn kun akvobasenoj kaj fontanoj. Mi estis invitita ĉe la domo de s-ro Morteza Habibpur, konata pentristo kaj bona esperantisto. Mi alvenis kun lia filo kaj mi sukcesis trovi la grupon de studentinoj kiuj lernas ĉe Morteza pentroarton. Ĉarmaj knabinoj-studentinoj. Ili estis sen kaptukoj en ateliero, kio surprizis min. Ili uzis la okazon kaj starigis al mi multajn demandojn rilate al E-to kaj aliaj virinaj temoj. Ni trinkis kune teon kaj manĝis kukojn. Mi ricevis donace kelkajn karikaturojn, plejparte kun temoj kontraŭ milito! Poste la edzino de Morteza montris ke ŝi ankaŭ okupiĝas pri arto, farante kadrojn por bildoj, sed por infanoj kun reliefaj bestoj kaj scenoj el rakontoj. Mi ĝue pasigis tiun tagon. La tagmanĝo estis bonega. Poste ni kune iris al la kurso.

En kursoj jam nenio nova ĉar ili akurate alportadas la hejmtaskojn kaj ĉiam pli bone parolas. La 21an de decembro mi pasigis en la domo de s-ro Behzad Hashemian kies edzino estas blindulino kaj instruas la blindulojn komputili. Ili estas tre agrablaj homoj. Laŭ la kutimo tiu plej longa nokto dum la jaro devas esti festata tiel ke kunvenas la tuta familio kaj ĉ. noktomezo oni devas manĝi akvomelonon kaj dividi al ĉiuj familianoj. Post la vespermanĝo ni iris al la loĝejo de la gepatroj, en la sama domo, kie estis la fratoj, bofratinoj, kaj multegaj genepoj. Ili diris ke la familio havas 14 genepojn. Ni estis regalitaj per kukoj kaj fruktoj, juglandoj, migdaloj, sekigitaj vinberoj, kikeroj, ktp. kaj poste grandega akvomelono estas dividita. La familio estis scivolema kaj parolema. Ni ĉiuj sidis en "turka sido" sur tapiŝo en grandega ĉambro sur grandega kaj dika tapiŝo. Ĉio estis servata sur la tapiŝo. Mi devas konfesi ke neniam dum mia vivo mi sidis kun tiom grandnombra familio kune. La morgaŭan tagon kun Behzad mi iris al ilia lernejo por blinduloj kie ili havas komputilojn kaj aliajn bezonatajn lernilojn. Ili eldonas eĉ ĵurnalon kaj havas informpaĝon en interreto. Tre diligentaj homoj kaj mi promesis fari kunligojn al ili kun niaj blinduloj el mia lando ĉar mi ofte vizitas la lernejon kaj faras prelegojn al ili, ĉar en Beogrado en blindula lernejo ili lernas libervole Esperanton. Ankaŭ mi eksciis pri programo uzata en komputilo kiu parolas en Esperanto kaj informis ilin pri tio. Kaj la kunligo okazis. En mia lando en Beogrado estos Kongreso de blinduloj en 2004 kaj Behzad planas iri la tiu kongreso kun edzino. Mi ĝojos denove vidi ilin.

Okazas la lastaj studhoroj en ambaŭ kursoj. Mi ne havas problemojn kun gestudentoj. Mi iris dormi al la hejmo de Bahar la ĉarma knabino, filino de Hamzeh konata E-isto kiu studas Esperanton en Pollando. Post vespermanĝo kaj longa babilado, Bahar iris al sia matraco. En la buso ankaŭ ŝi deziris sidi sur mia sino. Do, ŝi ne sentis ke mi estas fremdulo sed taksis min kiel veran avinon. Mi estis tute kortuŝita. La morgaŭan duontagon mi pasigis en la domo legante kaj ludante kun Bahar. Poste ni kune iris al la kurso kun ŝia Patrino. Do, la tuta familio fariĝos esperantista.

La vesperon mi pasigis ĉe la domo de filmisto Ramin Pahlavani, kiu loĝas en bela loĝejo kun du filoj kaj edzino, sed venis ankaŭ

lia patro. La apartamento estas eŭropece ekipita. Ni havis kun Reza Torabi kaj Zahra belan vesperon. Mi sola per taksio vojaĝis al la hejmo de Hamzeh. La taksiisto kelkfoje eraris la vojon sed haltis kaj demandis. Ili loĝas tre for kaj la stratetoj estas iom labirintaj. Tamen la taksiisto ne foriris ĝis kiam ne vidis ke la dommastroj akceptis min. Do, la ŝoforoj estas sufiĉe respondecaj. Tuj kiam mi eniris Reza jam interesiĝis ĉu mi en ordo alvenis. Mi konfesas ke mi iomete timis sola kun ŝoforo post la noktomezo en tuta senhoma regiono, ne komprenante eĉ unu vorton kion li klopodis diri al mi. Mi tri-foje montradis la adreson sed eble li ne estis tre bona "leganto".

La 22-an de decembro 12 gekursanoj iris kune al restoracio kune tagmanĝi kaj havis tradician manĝaĵon sed sidis ĉe la tablo. Estis faritaj multaj fotoj kaj kvankam ni trinkis nur jogurton kaj iranan bieron (ŝaumanta limonado, sed iom bruneta Ho!, ve!) ni ĉiuj estis viglaj kaj ĝojaj. Ja, hodiaŭ estos la adiaŭa tago! Venis la lasta instrutago. Ĉiuj sentis iun solenan etoson. Ni denove kantis ĉiun kanton kaj la ekzameno estis libera temo, pri kiu ni interparolis. Ankaŭ mi denove montris la plej gravajn partojn de gramatikaĵoj (ŝlosilon, la verban stelon, la korelativojn ktp.) por ke ili denove havu antaŭ okuloj tiujn ilustritajn partojn, kiujn ni lernis. Ili enskribiĝis en mia memorlibro kaj mi fiere povas diri ke ĉiuj esprimis sian kontenton kun mia instruado. Fotis sin lastfoje kaj regalis nin per kukoj kaj teo kaj poste venis la adiaŭo. Ĉiuj promesis daŭre lerni E-ton. Mi esperas! La unuan senlaboran tagon mi pasigis kun Reza Torabi en Nacia Muzeo de Tehrano. Vere grandega konstruaĵo kun multaj arkeologiaj kaj aliaj eksponaĵoj kiuj pruvas la malnovan kaj altan kulturon kiun ili havis jam antau 5-6000 jaroj sur tiu teritorio. Poste ni iris al Malnova Bazaro. Oni diras ke ĝi havas kelkdek kilometrojn da stratoj. Interesa estis la barilo ĉe enirejo ĉar inter feraj stangoj vi devas ŝovi vin internen. Tio estas pro tio ke la motorbicikloj ne eniru, kaj la ĉaretoj ankaŭ ne ĝenu la aĉentantojn. Tie ĉio haveblas kaj videblas sed al mi pleje plaĉis la homoj kaj la tumulto tra kiu ni traluktis nin. Mi vidis diversajn vizaĝojn kaj vere ekkredis ke en Irano vivas multaj nacioj kaj diversaj popoloj.

Mi aĉetis belan ĥatam-maniere kadritan murhorloĝon por ke mi memoru Iranon ĉiam, kiam rigardas kioma horo estas! Mi dormis ĉe domo de Hamzeh kaj li akompanis min la venontan tagon al flughaveno kie mi prenis flugon al Dubai kie mi ankaŭ deziris pasigi kelkajn tagojn. Pro tio ni ne faris ekskursojn al aliaj belaj urboj. Poste mi aŭdis pri terura tertremo kiu duonigis la urbon Bam. Ĉiuj miaj geamikoj telefonadis al mi kontrolante ĉu mi rehejmeniĝis antaŭ la tertremo. Mi profunde kunsentis kun familianoj de viktimoj. Mia lando sendis helpon al ili kaj mi estis pro tio kontenta.


Ĉe la pordego de malnova Tehrano

Dankon al ĉiuj kiuj helpis realigi mian taskon kaj fari ĉion en bonaj kondiĉoj. Apartajn dankojn al miaj organizantoj kaj gastigantoj kiuj ebligis ke mi eksciu kiamaniere ili vivas kaj luktas ŝvitante por ĉiutaga pano! Mi pardonpetas se mi forgesis iun mencii, sed estis multegaj helpemaj kaj amikemaj espertantistoj.

Fine mi povas diri ke Esperanto kaj ekzistas kaj funkcias, mi spertis tion! Mi vizitis multajn belaĵojn kaj famaĵojn sed la plej belegaj valorŝtonoj de Irano estas la karaj, sinceraj kaj ege agrablaj, gastemaj, amikemaj homoj. Mi nur bedaŭras ke mi ne povis viziti kelkajn historiajn urbojn el frua tempo.Sed tio igas min diri Irano ĝis revido! ★

Tereza Kapista Cseh-metoda instruisto el Beogrado, Serbio.

Larmo estas sekreto

Ahmad Ŝamlu

Larmo estas sekreto
Rideto estas sekreto
Amo estas sekreto

Tiu-nokta larmo estis la rideto de mia amo

Mi ne estas historio kiun vi povus rakonti
Mi ne estas kanto kiun vi povus kanti
Mi ne estas sono kiun vi povus aŭdi
Nek mi estas io kion vi povus vidi
Nek afero kiun vi povus scii

Mi estas la komuna doloro
Kriu min.

Arbo parolas al arbaro
Herbo al dezerto
Stelo al galaksio
Kaj mi parolas al vi

Diru al mi vian nomon
Donu al mi vian manon
Diru al mi viajn vortojn
Donu al mi vian koron
Mi estas trovinta viajn radikojn
Mi estas parolinta por ĉiuj lipoj per viaj lipoj
Kaj viaj manoj estas
Konataj al la miaj
...
Donu al mi viajn manojn
Viaj manoj estas
Konataj al la miaj
Ho! Vi kiun Mi estas eltrovinta tiel malfrue
Mi parolas al vi
Same tiel, kiel parolas la herbo al la dezerto
La nubo al la ŝtormo
La pluvo al la maro
La birdo al printempo
La arbo al la arbaro

Ĉar mi estas trovinta viajn radikojn
Ĉar via voĉo estas konata al la mia

Tradukis: Hamze Ŝafii

اشک رازی ست
لبخند رازی ست
عشق رازی ست

اشک آن شب لبخند عشقم بود

قصه نیستم که بگویی
نغمه نیستم که بخوانی
صدا نیستم که بشنوی
یا چیزی چنان که ببینی
یا چیزی چنان که بدانی

من درد مشترکم
مرا فریاد کن.

درخت با جنگل سخن می‌گوید
علف با صحرا
ستاره با کهکشان
و من با تو سخن می‌گویم

نامت را به من بگو
دستت را به من بده
حرفت را به من بگو
قلبت را به من بده
من ریشه‌های ترا دریافته‌ام
با لبانت برای همه لب‌ها سخن گفته ام
و دست هایت با دستان من آشناست
......

دستت را به من بده
دست‌های تو با من آشناست
ای دیر یافته! با تو سخن می‌گویم
بسان ابر که با توفان
بسان علف که با صحرا
بسان باران که با دریا
بسان پرنده که با بهار
بسان درخت که با جنگل سخن می‌گوید

زیرا که من
ریشه‌های ترا در یافته‌ام
زیرا که صدای من
با صدای تو آشناست

احمد شاملو

IRANA ESPERANTISTO





"...bonŝance venis
"IRANA ESPERANTISTO",
kiu diversnuance kaj riĉe proksimigas la kulturon de tiu ĉi fora lando. Jen per prezento de la materia kulturmonumento de tiu ĉi lando, granda turisma atrakciaĵo devenanta el la 10-a jarcento Bam-Citadelo, la plej granda adoba kontruaĵo en la mondo, kalkulita de UNESCO al la universala kulturheredaĵo..."
Radio Polonia, Barbara Pietrzak.

IRANA ESPERANTISTO estas internacia kultura sezon-magazino sendependa. Legante ĝin vi povas:
Konatiĝi kaj kun plej grandaj antikvaj persaj poetoj/mistikuloj ...
Sciiĝi pri gravaj eventoj en Irano, ekz-e en la 5a n-ro estis pli ol dek paĝoj pri Ŝirin Ebadi, NobelPacPremiito en 2003.
Lerni pri plej allogaj vidindaj lokoj (historiaj); ĝis nun ...
IRANA ESPERANTISTO aperas ĉiu-sezone sur 56 paĝoj, ĝi estas 29cmx20.5cm, kun koloraj kovrilpaĝoj, ISSN 1728-6174.
Pliaj informoj pri la magazino, kune kun enhavtabelo de 5-a n-ro alireblas en:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperantisto
Jen informfontoj pri la magazino en la persa:
http://www.sabzandishan/com ,
http://www.magiran.com/subscription.asp?mgID=2899

Interesita? Jen la Abon-informoj:
Jara abontarifo por internacia samideanaro:
Orienta Eŭropo, Azio, Afriko, Sudameriko: 15 Eŭroj.
Okcidenta Eŭropo: 20 Eŭroj.
Nordameriko, Japanio, Koreio, Oceanio: 25 Eŭroj.
Vi povas pagi la abonkotizon aŭ/kaj subtensumon al UEA, kodo: **iece-h**.

Perantoj de
IRANA ESPERANTISTO

Belgio:
FEL
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

POLLANDO:
Stanislaw Śmigielski
Ul. Krasickiego 12/6
PL-47-206 Kedzierzyn-Kozle

USONO:
Joel Brozovsky
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
1257 Hollis St
Emeryville CA 94608-2514, Usono
Por eventualaj legantoj en Usono: por la jaro 2004, la revuo "Irana Esperantisto" estas abonebla pere de la abonservo de ELNA (PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, tel +1 510 653 0998, retadreso: elna@esperanto-usa.org, ttt-ejo: http://www.esperanto-usa.org kaj iru al "Books & Other Materials" kaj poste al "Subscriptions").

Perantoj estas serĉataj en aliaj landoj!

Abonilo

Nomo: Familia Nomo: Aĝo: De kiu numero:
Ĝis kiu numero:
Adreso:

Poŝt-kodo: Telefono: E-poŝto:

Sendu la abonilon al la suba adreso (irananoj sendu kune ankaŭ kopion de pagdokumento): Sabzandiŝan Instituto, P.O.Kesto 17765-184, Tehrano, Irano.
E-poŝto: info@sabzandishan.com
Bonan legadon,
Irana Esperantisto